SALGÓTARJÁN

HUNGARA VIVO

2
1975
8,—Ft



VINEKONOMIAJ
ENTREPRENOJ
VINKELMASTRUMOJ

BORGAZDASÁGI VÁLLALATOK
PINCEGAZDASÁGOK

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
1368 Budapest, Hungario,
Kenyérmező u. 6.
Aperas dumonate
XV. jaro 1975. 2-a numero

Numero pri la liberiĝo de Hungario

ENHAVO

Zoltán Blau: Jubileo 1
István Örkény: Ni lernu fremdajn lingvojn! 3
Balado de la paco-Nia historio laŭ konfesoj de malnovaj fotoj (Komp. M. Gergely) . . . 4
Imre Baranyai (EMBA): En sonĝo 4
Gyula Illyés: Iras la plugil — Trad.: *M. Fejes* 5
Endre Illés: Inter vorticoj — Trad.: *M. Fejes* 6
Lajos Lesznai: Hungario — muziklando 11
La kultura stato de la naciaj minoritatoj en Hungario . . . 11
István László: Kiel laboras la Mondasocio de Hungaroj . . 12
Hungarologia Instituto en Jugoslavio 13
Panoramo — Komp. kaj trad.: *Sz. Bálint* 14
L. Benjámin: Mi volis fajron — Tr.: *K. Kalocsay* 16
Gy. Sipos: Oni min rekonos . . 16
A. Tasnádi: Bildoj al la naskoloko — Tr.: *E. Fenyvesi* . . . 16
V. Benczik: Esperantaj libroj en Hungarlando 18
Interparolado kun Jose L. Judas, sekretario de Intersindical pri la Portugalaj sindikatoj kaj pri la internacia lingvo — *A. Orbán* 19
Pri „Eszperantó Magazin" — *L. Rieth* 20
Fondiĝo de „Budapeŝta Esperanto-Arkivo" 20
Vilborg: La participa demando en la Akad. Rec. *Kalocsay* . . 26
Lajos Tárkony: Revuo de revuoj 27
Leterkesto — Korespondi deziras 30
FERI: Krucenigmo 31
Internaciaj Esperanto-Aranĝoj en Hungarlando 31

Desegno de Zoltán *Balássy* (3), Pál *Barczi* (5), Sándor *Kürthy* (9), Károly *Reich* (17).
Sur la titolpaĝo: La Elisabeta-ponto en Budapeŝto

Jubileo

La 4-an de aprilo ni festos la 30-an liberiĝan datrevenon de nia patrio. La liberiĝo limŝtonas en la historio de Hungario, ja dum la lastaj 30 jaroj nia vivo tute ŝanĝiĝis. Rezulte de diligenta laborado nia patrio ŝanĝiĝis al lando posedanta bonevoluan socialisman ekonomion. Ankaŭ nia socio transformiĝis radike. La kultura revolucio disvolviĝinte dum la lastaj 30 jaroj apertis larĝaj la pordojn de scienco kaj kulturo por nia tuta popolo, kaj ĝi levis nian landon inter la klerajn naciojn.

Post la liberiĝo de Hungario komenciĝis nova ĉapitro ankaŭ en la historio de la Esperanta movado. La futuro de la Internacia Lingvo dependis de tio, ĉu eblos kolekti la membrojn de la laborista Esperanto-asocio, disbatita en 1934, kaj la intelektulojn de la t. n. burĝa asocio. La ŝanĝitaj politikaj rilatoj kaj la plua evoluo de la movado postulis, ke ĉesu la aparto de la du asocioj, realiĝu la unueco de la movado. Ankaŭ la ekzemplo de Esperanta movado en najbaraj popoldemokratiaj landoj urĝis tion.

La disĵetitaj fortoj de nia movado kolektiĝis frue, kiam en la lando okcidente ankoraŭ furiozis milito. La sud-hungariaj esperantistoj komencis reorganizi la movadon fine de 1944. Ilian modelon sekvis la budapeŝtanoj, kiuj organiziĝis rapide post la liberiĝo de la ĉefurbo. Unue renoviĝis la laborista asocio la 25-an de marto 1945, ne longe poste la asocio de la intelektuloj. Post la estiĝo de la du centroj, komenciĝis ankaŭ la reorganizo de la grupoj ĉefurbaj kaj provincaj.

El la ĝisnunaĵoj videblas, ke denove estiĝis du asocioj, kio signifis la dividon de la hungara Esperanto-movado. Tamen la neceson de unuiĝo rekonis la gviduloj de ambaŭ asocioj. Jam aŭguste de 1946 traktis la landa Esperanto kongreso de Orosháza pri la unuigo de la du asocioj, sed decido pri tio ankoraŭ ne efektiviĝis. La manifesto realiĝis en 1947 ĉe la landa Esperanto-kongreso en Pécs, kie la partoprenintoj akceptis la proponon pri kunfandiĝo de la du asocioj. La decido plenumiĝis la 8-an de decembro 1947, kiam elektiĝis la nova estraro, kaj la nova landa organo estis nomita Hungara Esperanto-Asocio.

Jam antaŭ la kreo de organiza unueco la estroj de la movado ekagis por permeso lerneje instrui la Internacian Lingvon. La landa Esperanto-kongreso de Orosháza en 1946 peticiis al la ministro pri religi-kaj klerig-aferoj. En la peticio ili petis la ministron, ke li permesu la instruadon de Esperanto en lernejoj. Post la kongreso unu el la esperantistaj parlamentanoj interpelaciis al la ministro, en la sama afero, sed tiu rifuzis la proponon de la deputito. La plimulto de la parlamentanoj akceptis la respondon, escepte la plimulton de la komunistaj deputitoj kaj la tutan socialdemokratan deputitaron. La favora starpunkto al Esperanto far la deputitoj de la du laboristaj partioj estis gravsignifa, malgraŭ ke la propono voĉdone ne ricevis aprobon.

Je ĝia efiko la ministro pri religi- kaj klerig-aferoj ediktis la 13-an de februaro 1947, ke la instruo de Esperanto estas permesata, sed nur en bazlernejoj, en komercaj kaj industrilernejoj. Sed la edikto ne koncernis la konsiderindan parton de mezlernejoj. Pro tio esperantistoj laborantaj en la parlamento redaktis novan peticion, en kiu ili urĝis, ke la ministro ampleksigu

la edikton je ĉiu mezlernejo. Ĉi dokumenton subskribis 102 parlamentanoj, inter ili 35 komunistaj kaj 21 socialdemokrataj deputitoj. Laŭnome subskribis ĝin ekzemple István Kossa, sekretario de Sindikata Konsilio, Aladár Mód, marksisma historiisto, László Rudas, marksisma filozofo, Miklós Somogyi kaj Sándor Rónai, konataj gviduloj de hungara sindikata movado, István Dobi, posta prezidulo de Prezidia Konsilio, Ferenc Erdei, akademiano, Péter Veres, konata verkisto. Sed la peticion oni ne pritraktis, ĉar deputitoj kaj ministroj tiutempe okupiĝis pri pli gravaj kaj urĝaj aferoj.

La hungaraj esperantistoj faris multon jam tiam por la intereso krei kaj evoluigi la amikecon kaj kunlaboradon inter la najbaraj popoloj. Elstara evento de tiuj kontaktoj estis la 1-a Danubvala Esperanto-konferenco kiu aranĝiĝis en Budapeŝto partoprenate de hungaraj kaj najbaraj esperantistoj el kvar landoj. La partoprenantojn de la konsiliado akceptis pluraj ŝtat- kaj partigviduloj.

Estas konstateble el la supra skiza konigo, ke la hungara Esperanto-movado atingis atentindajn rezultojn, kreiĝis ja la homogena organo de la movado, oni ricevis eblon lerneje instrui la Internacian Lingvon, kaj eĉ la internaciaj kontaktoj de la asocio evoluiĝis unuece. La daŭrigo de la kuraĝiga komenco tamen prokrastiĝis.

La militdanĝero formiĝinta en la 50-aj jaroj akrigis la internacian streĉecon, kaj tio ĉi estigis atrofion en la internaciaj kontaktoj de nia movado. Pliakrigis la situacion, ke la internacie izolitan asocion dum la jaroj de personkulto ĉirkaŭis atmosfero de malfidemo. En ĉi situacio la asocio ĉesis funkcii. Inter 1950—55 la Esperanta movado paŭzis en Hungario. Nur aŭtune de 1955 komenciĝis reviviĝi la movado, kiam formiĝis la Hungara Esperanta Konsilio, kiu permesite de la kleriga ministerio direktis la instruon de Esperanto en kulturdomoj kaj ekorganizis la esperantistajn grupojn. Tiuj povis funkcii kiel fakrondoj de la menciitaj kulturcentroj.

La reorganizado de la landa asocio realiĝis nur post kiam likvidiĝis la sekvoj de la kontraŭrevolucio 1956-a, kaj tiuj de personkulto, ĉe la eko de socialisma demokratio. La 30-an de oktobro 1960 fondiĝis la Hungara Esperanto-Asocio, kiu dum la lastaj 15 jaroj sukcese plenumis la rolon de gvida organo en la Esperanto-movado. Ĉi lastaj 15 jaroj jam estas nia nuntempo, kaj eĉ listigi niajn sukcesojn estus malfacile. Ni devas arbitre elkaptante mencii kelkajn eventojn kadre de tiu ĉi artikolo. Nia asocio funkcias per la financa kaj morala helpo de la hungaraj sindikatoj. Ĝi disponas pri du ĵurnaloj: de 1961 Hungara Vivo, kaj de 1973 la dulingva Eszperantó Magazin helpas nian movadon, kies internacian rekonon montris, ke la Esperanta mondkongreso de 1966 estis aranĝita en Budapeŝto. Dum la lastaj jaroj ni akiris rekonindajn sukcesojn sur la tereno de instruado esperantlingva. Permese de la ministro pri klerigo ni instruas la lingvon en multaj baz- kaj mezlernejoj, kiel elekteblan lernoobjekton. La Budapeŝta Scienca Universitato komencis unua en la mondo la edukadon de instruontoj Esperanto-fakaj. Krome ankaŭ en pluraj instruistedukaj institutoj edukiĝas lingvoinstruontoj. La internaciaj rilatoj de nia movado evoluis ankaŭ sukcese dum la lastaj 15 jaroj. Ni aranĝas jare internacian Esperanto-renkonton en nia patrio, kaj ne ekzistas grava internacia esperantista konsulto, kiun ne partoprenus hungaraj esperantistoj.

Ankaŭ ĉi mankhava denombro pruvas: nia postliberiĝa Esperanto-movado vivas kaj luktas venkinte multajn kontraŭaĵojn.

La 30-an jubileon de nia liberiĝo la hungaraj esperantistoj salutas kun la plaĉa sento, ke nian movadon ĉirkaŭas estimo kaj fido en nia lando. Ni fieras pri tio, ke dum la lastaj 30 jaroj per niaj propraj rimedoj ni helpis la noblan aferon de interpopola paco kaj amikeco.

Zoltán BLAU — Trad.: GABRO

Kalendaro

1895—02—01 — Antaŭ 80 jaroj naskiĝis Ferenc SZILÁGYI, esperanta verkisto, poeto kaj eldonisto. (Vidu HV. 65/3; 68/1, 2—3.)

45—02—12 — Antaŭ 30 jaroj liberiĝis Budapeŝto.

1825—02—18 — Antaŭ 150 jaroj naskiĝis Mór JÓKAI la plej granda hungara verkisto. (Vidu HV. 68/4 kaj 75/4.)

1875—03—04 — Antaŭ 100 jaroj naskiĝis la granda hungara politikisto, Mihály KÁROLYI. (Vidu HV. 62/3.)

1910—03—08 — Antaŭ 65 jaroj laŭ la propono de Clara ZETKIN oni solenis la unuan feston de „INTERNACIA VIRINA TAGO".

1955—03—11 — Antaŭ 20 jaroj mortis Sir Alexander FLEMING, Nobel-premiita angla kuracisto-bakteriologo, eltrovinto de penicilino.

1900—03—19 — Antaŭ 75 jaroj naskiĝis Frederic JOLIOT-CURIE, Nobel-premiita franca atomfizikisto, pacbatalanto.

1895—03—22 — Antaŭ 80 jaroj naskiĝis Béla ILLÉS hungara verkisto.

1905—03—24 — Antaŭ 70 jaroj mortis Jules VERNE, franca verkisto. En lia lasta romano Esperanto havas rolon. Li estis esperantisto.

1885—03—29 — Antaŭ 90 jaroj naskiĝis Dezső KOSZTOLÁNYI, hungara verkisto. (Vidu HV. 66/1.)

1900—03—31 — Antaŭ 75 jaroj naskiĝis Lőrincz SZABÓ, hungara poeto (Vidu HV. 66/4.)

1905—04—11 — Antaŭ 70 jaroj naskiĝis Attila JÓZSEF, hungara poeto. Lia naskiĝtago estas en Hungario „TAGO DE LA POEZIO". (Vidu HV. 61/3—4.)

1885—04—13 — Antaŭ 90 jaroj naskiĝis György LUKÁCS, mondkonata marksista filozofo, estetikisto.

1955—04—18 — Antaŭ 20 jaroj mortis Albert EINSTEIN, Nobel-premiita germana fizikisto, ellaboranto de la teorio pri relativeco.

1945—04—25 — Antaŭ 30 jaroj komenciĝis la fonda kunsido de „UNUIĜINTAJ NACIOJ".

Komp. L. RIETH

István Örkèny:

Ni lernu fremdajn lingvojn!

Mi ne komprenas germane.

Inter Budjonnij kaj Aleksejevka ni devis suprenigi sur monteton plurajn kanonojn, ĉar ili ĝis radcentro enkotiĝis. Kiam la trian fojon venis mia vico, kaj ĉirkaŭ la mezo de la deklivo komencis regliti la brutpeza pafilego, mi imitis, kvazaŭ mi irus por fari neceson, kaj mi alflankiĝis.

Mi konis la direkton al nia kvartiro. Trairinte grandegan sunflor-kampon mi atingis stoplejon. La grasa, nigra tero gluiĝis al miaj ŝuoj, kiel la plumbo-aldonaĵoj de la subakvigistoj, kun kiuj ili mergiĝas al marfundo. Mi pensas, mi iris dum dudek minutoj, kiam mi subite troviĝis rekte okulo al okulo kun hungara serĝento kaj kun germano, pri kiu mi sciis nenion, ĉar mi ne konis la germanajn rangojn. Estis frenezige malfeliĉa afero ĝuste kuri inter iliajn brakojn, ĉar la tereno estis tute ebena.

La serĝento staris, la germano kun genuoj disetenditaj sidis sur malgranda tendara seĝo. La serĝento tabakfumis, la germano manĝis. El ia tubo, simila tiun de dentkremo, li eligis fromaĝo-paston sur panpecon, kaj nur per okuloj donis al mi signon halti.

— Was sucht er hier? — li demandis.

— Kion vi serĉas ĉi tie? — tradukis la serĝento. Mi diris, ke mi perdis mian taĉmenton.

— Er hat seine Einheit verloren — diris la serĝento.

— Warum ohne Waffe?

— Kie estas via pafilo — demandis la serĝento. Mi diris, ke mi apartenas al laborservo.

— Jude — diris la serĝento.

Tiun vorton ankaŭ mi komprenis. Mi klarigis, ke mi ne estas judo, sed kiel peranto de la sindikata gazeto mi estis enkadrigita en specialan labor-roton.

— Was? — demandis la germano.

— Jude — diris la serĝento.

La germano stariĝis. Li forigis la panerojn de sia kamizolo.

— Ich werde ihn erschiessen — li diris.

— Vin la sinjoro Feldwebel nun mortpafos — tradukis la serĝento.

Mi sentis, ke min inundas la ŝvito kaj ekkirliĝas mia stomako. La germano ŝraŭbfermis la fromaĝpastan tubon, kaj prenis la pafilon. Eble, se mi scius germane, mi sukcesus klarigi al li, ke mi ne surhavas flavan brakbendon, do mi ne povas esti judo, kaj tiam ĉio okazus alie.

— Er soll zehn Schritte weiter gehn.

— Iru for dek paŝojn — diris la serĝento.

Mi iris dek paŝojn. Dume ĝis maleolo mi enkotiĝis.

— Gut.

— Bone.

Mi haltis. La Feldwebel levis la pafilon kontraŭ mi. Mi memoras nur tion, ke subite mia kapo terure peziĝis, kaj preskaŭ diseksplodis miaj intestoj. La Feldwebel mallevis la pafilon.

— Was ist sein letzter Wunsch? — li demandis.

— Kio estas via lasta deziro? — demandis la serĝento: Mi diris, ke mi volas neceseji.

— Er will scheissen — tradukis la serĝento.

— Gut.

— Bone.

Zoltán Balássy: La Tempo

Dum mi faris mian aferon, la Feldwebel tenis la pafilon kun la kolbo altere. Kiam mi stariĝis, li levis ĝin.

— Fertig? — li demandis.

— Ĉu finite?

Mi diris, ke finite.

— Fertig — raportis la serĝento.

La pafilo de la Feldwebel veršajne pafis false, supren, ĉar li celis al mia umbiliko. Mi staris tiel ĉirkaŭe minuton aŭ unu minuton kaj duonon. Poste plu al mi celante diris la Feldwebel:

— Er soll hupfen.

— Ransalto — tradukis la serĝento.

Post la ransaltado sekvis rampado. Post la rampado dekkvin brakfleksoj en kuŝanta pozo. Fine diris la Feldwebel, ke mi turniĝu retro.

Mi faris retroturniĝon.

— Stechschitt!

— Parada marŝo! — interpretis la serĝento.

— Marsch! — diris la Feldwebel.

— Marŝo, ek! — tradukis la serĝento.

Mi ekiris. Eĉ iri estis apenaŭ eble, ne fari paradan marŝon. Flugadis la kotbuletoj super mia kapo.

Mi povis antaŭeniri nur kun freneziga malrapideco, kaj dume mi sentis, ke la Feldwebel celas al la mezo de mia dorso. Eĉ nun mi scius montri la punkton, al kiu direktiĝis la pafiltubo. Se ne estus tiu granda koto, mia timego daŭrus nur kvin minutojn. Sed tiel pasis eĉ duonhoro, ĝis mi kuraĝis alteriĝi kaj rerigardi.

Ankaŭ itale mi ne komprenas: bedaŭrinde mi ne havas kapablon por lingvoj. Pasintjare somerumante en la kadro de dektaga IBUSZ-grupvojaĝo en Rimini, antaŭ la luksa hotelo Regina Palace mi rekonis la Feldwebel. Mi ne havis bonan ŝancon. Se nur duonminuton pli frue mi alvenus tien, mi mortbatus lin, sed tiel li min eĉ ne rimarkis. Kun pluraj aliuloj li suriris vitrotegmentan ruĝan buson, dum mi, pro manko de bezonata lingvoscio, sciis nur hungare kriegi:

— Ne startu! Elbusigu tiun faŝistan porkon!

La hotelpordisto, duonkapon pli alta ol mi, kolorhaŭta sudano, min minacis per fingroj kaj mansignis, ke mi forportu min. Ankaŭ al li mi ne povis klarigi, kio okazis, kvankam li eble krom la itala komprenis ankaŭ la francan kaj la anglan. Sed mi, bedaŭrinde, krom la hungara parolas neniun alian lingvon.

Laŭ originalo aperinta en Eszperantó Magazin, tradukis: M. F.

1945 — 1975

Nia historio laŭ konfeso de malnovaj fotoj

Balado de la paco

La bienreformo: kamparanoj sur sia nova bieneto

Novbienulo en 1945

La unua rikolto en 1945

IMRE BARANYAI (1902-1961)

EN SONĜO

En sonĝo princinon mi vidis
kun vangoj malsekaj de ploro.
Popolo bienojn dividis,
jen kial ŝin kaptis hororo.

Feliĉo de plebo kampara,
por mi ĝi ne estas havinda!
Bieno grandega kaj kara,
vi estas aminda, savinda!

Ni ĝin dum mil jaroj posedis
— ŝi plendis dum verŝo de larmoj —,
nun oni ĝin rabis, dispredis,
kaj nin ne defendis ĝendarmoj.

Por kio al plebo ĉifona
la tero, la bienmastriĝo,
ne scias ĝi, kio la bona,
ne scias plezuri el riĉo!

Ĝi scias ja nur laboregi,
brutforte toleri kun flegmo.
Ni sciis plezuri kaj regi,
ni estis ornamoj de l' regno!

Al lando ekstera mi iros
— ŝi diris kun flamaj okuloj —,
de tie la damnojn mi diros
al vi, malamataj kampuloj!"

(1945)



Pál Barczi: Biendistribuantaj kamparanoj

GYULA ILLYÉS

IRAS LA PLUGIL'...

Iras la plugil', pli kaj pli
sulkoj aras,
kiel se liniojn libre
oni faras.
La paper' — la kamp' marvasta,
kaj la plumo
estas la servul' de granda
bienmastrumo.

Iras la plugil', vic-vice
libro kreskas,
la leganto unu sola
nur mi estas,
nur mi povas inde taksi
ĉi aferon:
li unuafoje plugas
propran teron.

Iras la plugil', bovinoj
du ĝin tiras,
kiel panjo kun infano
ili iras;
tank-ruinon nun evitas
ili saĝe:
restu tiu en la libro
ilustraĵe.

Iras la plugil': hungaro
pluge pasas,
kvazaŭ li mem estus ilo,
li ne lacas.
Kreskas agro el novalo.
Hungario,
jene nun skribiĝas via
historio.

Kiu do ĉi granda plumo
anonima ?
Mi atendas lin ĉe sulko
apudlima
por man-prem', sed li ne haltas:
per braklevo
signas nur, ke lin atendas
plu la devo.

Tr.: **Márton FEJES**

Endre Illés:

Inter vorticoj

En la malplena eturba kafejo mi turnis min al la kelnero. Mi mendis ĉerizbrandon, tuj li ĝin portis. Li estis saĝa, retiriĝema, maljuna. Malglata kiel la cidonio, kaj iomete li lametis.

Mi demandis lin:

— Ĉu vi konas sinjoron Mihály Kotróczi?

Li rigardis, pensadis.

— Ĉu Kotróczi?... Tian gaston ni ne havas.

Li returniĝis al la mamriĉa kafkuiristino.

— Ica, ĉu vi konas?

La junulino, ĝuste trančanta siajn ungojn, alrigardis por momento.

— Ĉu Kotróczi?... Mi ne aŭdis tiun nomon.

La maljuna kelnero sin ekskuzis:

— Ja ni estas ĉi tie nur de kvin jaroj. Eble demandu aliulojn.

Kial demandadi, mi pensis. Mi vizitos lin. Ja pro li mi venis en la urbon N.

***

Pri nia soldata ekzercinstruado tiutempe — en la kvara jaro de la milito — fakte okupiĝis nur tri personoj. Pri la *duoblaj formacioj,* pri la *turniĝoj dekstren, — maldekstren ek,* pri la *parada marŝo* kaj pri similaj informis nin pleje la kaporalo havanta du steletojn, pri la manipulado per armiloj nin instruis la serĝento, kaj ĉi tiujn kontrolis juna, molkarna, pastvizaĝa leŭtenanto malzorgeme kaj senanime, en tia maniero, ke de tempo al tempo li aperis inter ni, haltis antaŭ la enviciĝinta plotono, elpinĉis iun, kaj poste tiun malfeliĉulon li turmentis, turnis, pridemandadis, primokis, ĝis la okuloj de lia viktimo jam rigidiĝis pro la timo kaj humiligo, kaj fine li repuŝis lin en la vicon. Mi ripetas: ni estis en la kvara jaro de la milito. Ili estis malzorgemaj, indiferentaj. Ili mem ankaŭ timis. Ili rapidis.

Estis eble ilin ankaŭ manĝ-, kaj drinkregali. Eĉ, tio estis necesa, sed nur en konvenaj duonhoroj, kaj nur sub la rango de leŭtenanto.

Li mem deziris teatrajn biletojn, sed kun tiuj decis aldoni ankaŭ lertajn mensogojn, kaj tion povis fari nur brakpasamentuloj.[1]

Ni esceptmaniere havis bonan sorton, la kazerno jam estis plenplena, kaj tiel estis al ni permesate dormi hejme. Sed la karieristoj jam senpacience atendis la batal-taktikajn manovrojn — ili volis kuri, rampi, alteriĝi kaj tuj eksalti, kuŝiĝi en marĉetojn, sin kaŝi en terkavoj kiel eble plej baldaŭ kaj plej ofte. La milito tiutempe jam estis tre kruda realo. Ĉu vi volas ĝin transnaĝi viva? Lernu, do, kiamaniere oni povas transnaĝi.

Tio ĉi okazis ĉi tie en Budapeŝto, ĉe komandantejo de rezerva kadro. Tiel ni vivis jam de kvar semajnoj, jen senfare, jen ŝvitante kaj preskaŭ sufokiĝante, en certaj fazoj de la ekzercado pro la laceco kvazaŭ vaporumante — kaj tiam, fine de la kvara semajno alvenis ordono: mi devas min anonci ankoraŭ samtage en la kontoro de la regimento.

Miaj kunuloj timigis min per diversaj ĥimeraj rakontoj, la ekzercigaj superuloj sciis pri nenio, do mi ekiris angore al la nekonataj potencoj. Tie subite — kaj neatendite — ŝanĝiĝis mia sorto kaj eĉ ne je la plej malbona. En la kontoro oni mallonge sciigis al mi: oni utiligos mian enskribitan profesion — mi estas verkisto, estos skribisto.[2]

Tuj mi trovis min en grandega ĉambro, kiu nur ĉe unu muro havis du fenestrojn kaj meze lumis nur elektra lampo. Ĉirkaŭe apud la muroj viciĝis grandpordaj, profundaj ferŝrankoj en *streĉa rigidpozo,* meze estis kvar skribotabloj, kaj ĉe la kvina, kontraŭ ni havis lokon maljuna serĝento, la ĉambrestro, ĉefo de la kvar soldatoj-skribistoj. La skribistoj diligente skribaĉis, kiel baldaŭ klariĝis: kunvok-ordonojn. Tio estis tre urĝa laboro, pro tio la trupo estis plifortigita per du novuloj: mi estis unu.

Kiu jam ricevis tian kunvokilon, tiu scias — ĝi estas la plej simpla presaĵo. Sciigas du indikojn: kie kaj kiam. Tio estas sur la unua flanko. Aliflanken venos la adreso. Tiom estis mia laboro.

La indikojn sciigis al ni blanka karto. Per tiuj oblongaj kartoj estis plenŝtopitaj longaj skatoloj, havantaj desupre aperturon. La skatoloj staris en la mallumo de la ferŝrankoj.

Ĉio estis klare trarigardebla. La kartoj efike simpligis la vivon; sciis: kiu kie vivas, kiam li naskiĝis, kian nomon li havas, kaj ili ne forgesis pri la plej grava afero: ĉu li estas taŭga por militservo aŭ ne, kaj kiam li partoprenis kuracistan priesploradon? Tie estis kune unuopaj vilaĝoj, distriktoj, departementoj, inter ili ankaŭ kelkaj urboj laŭ la severa ordo de la mapo kaj de la sektoro. Ĉu necesas krom tiuj scii pli pri la homoj kaj pri iliaj kolektivoj?

La laboron determinis la naskiĝjaroj, eĉ diversmaniere. Ankaŭ la kvanton — ĉar kvar jaroj estas duoble du. Kaj en tiu aŭtuno ni devis ellevi el la skatoloj kartojn de kvar naskiĝjaroj. La laboro ĉe la skribotablo estis do ne nur adresado, sed ankaŭ elektado. La envokitojn ni devis meti aparten en severa ordo.

Nu, kaj la serĝento? Li ne nur disdonis la laboron kaj inspektis, krom tio li estis ankaŭ la *spikumanto.* Ĉu klarigi? Kiel post la grenrikolto oni kolektas la spikojn restintajn sur la stoplejo, ankaŭ li trafoliumis post ni la slipetojn: ĉu ne forrestis iu el la asignita jaro?

Tie ne estis eble bonintenci, favori iun, savi hazardan konaton aŭ nekonaton. Tie ĉiu spiko estis rikoltita. Jam staris ses skribotabloj, kune kun tiu de la serĝento: sep; ni tranĉrikoltis grandajn kampojn.

Kion pensis la aliaj dum la laboro? Certe la samon, kion mi. Tion, kio ne lasis min libera eĉ por minuto: malantaŭ ĉiu surpaperigita nomo, adreso, malantaŭ ĉiu karto estas homo, kiu post du tagoj elpaŝos de la tiama vivo, adiaŭos la gepatrojn, sian edzinon, siajn gefilojn, gefratojn, geamikojn — kiu kiun havas — kaj aliĝos al alia marŝo kaj ekiros alidirekte sur alia vojo. Ĉu revenos iam, kiujn ni tiel ekirigis? Kiu povis scii? Sed tion, kien ili iros, ni ĉiuj sciis.

Estis nomoj simpatiaj, ankaŭ malsimpatiaj, sed indiferenta restis neniu. Ĉe kelkaj mi haltis fojefoje kaj meditadis: kiu li estas, kia li povas esti? Ili ĉiuj estis junaj viroj sub la aĝo de tridek jaroj. Nia sektoro estis grandega, sed Budapeŝto ne apartenis al ni: tial konatan nomon mi neniam renkontis.

La imagatajn vivojn mi povis desegni en la eigaredfumon antaŭ min elspiritan laŭ du indikoj: laŭ nomo kaj profesio. Mi nur miris, kiom da moknomoj kaŝiĝas en la hungara vivo. Komence nin haltigis tiuj multaj langmontraj mokmienoj, la familiaj nomoj: *Szagos, Durrancs, Hadari, Sóhajtó, Kebles;* kaj la pli malĝentilaj: *Véres, Bolhás, Siket Pribék,* la nomoj *Kakas* kaj *Kakás,* la *Szarzó,*[3] kaj la tute krudaj, sed tiujn mi jam ne revokas el forgeso. Baldaŭ mi komprenis: el la nomoj jam defalis la plumbokerno, kaj ili jam delonĝe ne povas signifi, kion ili origine signifis; la mokcele elpafita kuglo jam ne trafis homon.

Pli multe ol la nomoj al mi sciigis tio, de kio en la ĉiutaga vivo ili triviĝis, aŭ kio ilin ellevis favore, aŭ ĝuste en kio ili trovis apogilon: ĉu terkulturisto, muzikinstruisto, meblisto, meĥanikisto, laboristo, tajloro kaj denove terkulturisto, terkulturisto, terkulturisto kaj kolorigisto, cimbalmisto, kelnero, bakisto, rimenisto, korbfaristo — tiuj vortoj enportis la eksteran vivon en la duone prilumigitan sed je blindige blanka kolorigitan ĉambron. Tiuj vortoj jam povis ekirigi la fantazion.

Ĝi ekiris kaj baldaŭ iĝis laca.

Ĉirkaŭ tridek — kvardek sekundoj restis por unu homo, por lia nomo.

Jam la unuan tagon mi komprenis, kial oni gardas tiujn kartojn en ferŝrankoj: se perdiĝus nur unu peco, la homo povus vivi plu, sed ĉi tie oni ne scius plu pri li. Li kaŝe eligus sin el la brakumo de la Granda Ordo, li promenus for el la horizonto.

Ĉu oni havis kopiaĵojn pri la kartoj? Mi ne sciis. Kiam mi demandis tion, nia serĝento nur ridetis mistere. Mi pensis, ke ankaŭ li ne scias. Eble ekzistis ia kadro-listo aŭ registrilo, sed tiun oni gardis ne alproksimigeble, aliloke, ne ĉi tie, de kie la kunvokaj fajfsignoj elflugadis.

Kaj kiam mi tion trapensis: tuj venis al mi la tento — *ellevu la karton!* Ekzemple ĉi tiun, aŭ la alian, tiun de la muzikinstruisto, terkulturisto, meĥanikisto. Kion vi atendas? Kial tremiĝas via mano? Ne timu, kiu atentas vin?

Sed ĝuste tio min haltigis, ke oni observis min, de ĉiu direkto mi estis observata. De kontraŭe la serĝento, kiu nur ŝajnige fingrumis sur la tablo, cetere li nin kaŝobservis per siaj ruzaj vulp-okuloj, eĉ dum duonhoro li povis rigardi iun sen palpebrumado. Sed super la kartoj atentis ankaŭ la aliaj, antaŭ mi, post mi, apud mi — kiel mi estus sciinta, kiu estas la komisiita denuncanto kaj kiu raportus pri mi memvole, sekrete en la unua konvena minuto? Ni ĉiuj observis unu la alian.

Jam la duan tagon mi pensis pri tio, sed mi ne havis kuraĝon ĝin realigi. La trian tagon fine mi prilaboris sistemon: la karton mi levos el la skatolo, kaj kvazaŭ la nomo estus malfacile legebla, mi deproksime ĝin literumos, kaj poste anstataŭ surtabligi, mi atente ĝin prenos kaj englitigos en la superan poŝon de mia kamizolo, per maldekstra mano — en la dekstran poŝon. Eble ĉirkaŭ dek fojojn mi faris jam tiun vojon — nur ĝis la duono. En la lasta momento de la sekundo mi ĉiam rimarkis: iu ĵetas rigardon ĝuste al mi.

Nur la kvaran tagon sukcesis la afero.

Mihály Kotróczi — mi legis de karto. Kaj sube: *juvelisto.* Tiu profesio al mi kvazaŭ rimis kun arto. Ĝi signifis la belan laboron, delikatajn objektojn, la valormetalojn. Unu el miaj kuracist-profesoroj en sia libera tempo amuziĝis per juvelista laboro. Mi vizitis lin foje, li montris la metiejon — envie mi rigardis. Tiutempe dum unu-du jaroj ankaŭ mi promesis al mi mem: iam ankaŭ mi ludos per tiu bela ludo.

Do, tiun juveliston, tiun Kotróczi mi nun levos el la vico! Mi eĉ ne ĉirkaŭrigardis, nek elektis pli komplikitan manieron, la karton mi simple enpoŝigis.

Dum kelkaj minutoj estis granda silento ĉirkaŭ mi. Kvazaŭ mi estus metinta en miajn orelojn vakson aŭ vaton, aŭ ĝuste la pezan silenton mem — dum certa tempo mi aŭdis nenion el la mondo. Kaj neniu alparolis min. Mi komencis reviviĝi.

— Dio vin vivigu, Kotróczi! — mi diris vespere jam hejme al la blanka karto metita sur la tablon de la verpermanĝo. Mi verŝis vinon en glason, eltrinkis.

— Post la milito mi vizitos vin, kaj ni ci-diros[4] unu al la alia.

Mi esperis, ke mi povos plimultigi mian kolekton da ellevitaj kartoj — sed tio jam ne sukcesis. La ruzokula maljuna serĝento sekvatage jam donis. al mi tute alian laboron. Komence mi suspektis, ĉu eble li rimarkis ion, kaj min solan li direktas al alia laboro, sed poste mi vidis-aŭdis, ke ankaŭ la aliajn skribistojn.

Klariĝis, ke la grandajn kunvokojn ĵus pasinttage ni finis — sekvis la nova ordigo de la ĵus envoki-

taj, en novaj skatoloj. Poste ankaŭ tion ni finis. Post unu semajno mi estis ordone revokita de la kontoro al la ekzercejo.

Post naŭ semajnoj mi ekssoldatiĝis.

***

Jam delonge mi forgesis pri Mihály Kotróczi, kiam post jaroj la blanka karto aperis antaŭ mi el la fundo de la tirkesto. Subite ĉio venis al mi en la kapon: la ferŝrankoj starantaj en *strecâ rigidpozo*, la sep skribotabloj, la arego de la kartoj, eĉ mia voto, ke post la milito mi kaj Kotróczi ci-diros unu al la alia.

Mi rigardis la karton: jen la adreso, urbeto en departemento Peŝt, la strato, numero. Ĉu li vivas ankoraŭ? Ĉu li transnaĝis viva? Kaj fakte, kiu li estas? Juvelisto, tion mi scias. Sed vere, kiun mi savis? Mi esperas, ke homon bonan. Mi ekridetis: kial li ne estus bona, ja li estas juvelisto. La gildo de la juvelistoj iam tre severe elektis siajn membrojn. Eĉ, mi serĉis foliumante la poemon de György Felvinczi en la Antologio de Malnovaj Hungaraj Poetoj — li skribis pri ili en la poemo „Konkuro pri la juvelista metio" jene:

Juvelarto estas tia,
ke neniu fak' alia
facile ĝin superas...

Kaj tiel plu. Bone, bone! Iam estis tiel. Sed ĉu hodiaŭ? Tamen mi devus lin viziti.

Mi jam ne promesis al mi fariĝi juvelisto en la liberaj horoj, sed viziti Mihály Kotróczi — tion jes.

Baldaŭ mi sidiĝis en la aŭton de mia amiko, kiam mi havis aferon tiudirekte. Li veturis plu, kaj mi elaŭtiĝis en urbo N, ĉe la ĉefplaco. Ni priparolis, ke vespere, je la sepa li revenos por mi.

Do, mi estas ĉi tie.

La karto estas en mia poŝo, en la sama, en kiun mi ĝin englitigis. Kaj mi ekiris al lia strato, sed antaŭe mi eniris en kafejon — tie oni ne konis lin. Nek la kelnero, nek la kafkuiristino.

Tiu N. estas vilaĝo-urbeto de plata ebenaĵo, plie vilaĝo, havanta nur unu straton — la Kossuth-straton — kies nomo intertempe ne ŝanĝiĝis. Dum mi iris al la Kotróczi-domo (ja mia karto sciigis ankaŭ la numeron), subite mi ekkonsciis, ke mi pensadas laŭ pentraĵoj.

Mi trovos junan virinon en pura beleta kuirejo; ĝuste ŝi surtabligas la tagmanĝon; ĉe la pretigita tablo sidas du geknaboj, unu kvinjara, tiu estas knabino; la alia ne havas ankoraŭ tri jarojn, li estas knabo. Tiu knabo estas sidigita sur plialtigitan seĝon kaj li jam senpacience atendas, ke oni lin nutru, sed la patrino lin atentigas pri silento: metu reen la kuleron, ni devas atendi vian patron. Kaj en la bruna fono konjekteblas ombro de viro: li jam flankenmetis la ilojn, lavis siajn manojn, sed la ombro malkaŝas provizore nur tiom, ke li estas alta viro — lian vizaĝon mi ankoraŭ ne vidas.

Moke mi pinĉatentigis min: jes, jen. Chardin pentris tiajn belajn, pacajn, bruneskajn idiliojn kaj pli idiliajn naturpentraĵojn: altajn, krakantajn panojn, grandegan anser-hepaton; iu verŝas vinon en dikventran botelon, la majstro portas okulvitrojn kaj havas tri peketojn: preferon al pomo, bulbo kaj pipo. Kial mi pensis ĝuste pri Chardin — ĉar pri li mi diskutis antaŭ kelkaj tagoj kun mia pentristo amiko, kaj dum nia diskuto klariĝis, ke mi eĉ ne ŝatas Chardin-on.

Ne! Mi ne metas mian juveliston Kotróczi en tian Chardinan mondon. Nur tiuj du geknaboj... pri ili estus malfacile rezigni. Ja tiu knabino kaj la knabo sidanta sur tiu plialtigita seĝo naskiĝis jam *de tiam*, ili propradire povas danki al mi, ke ili vivas, ja se mi ne ellevus tiun certan karton, ilia patro certe neniam revenus de la rusaj neĝokampoj, lia edzino vane lin atendus, kaj la infanoj eĉ ne naskiĝus.

Sed ni serĉu prefere hungaran scenon, ekzemple ĝenron de Szinyei-Merse: la *Vestsekigon* — tiu estas pli bona, pli serena, pli aŭtentika kaj multe pli freŝa.

En la korto de la Kotróczi-domo nun floras fruktarbo, de strečita ŝnurego pendas sekiĝantaj vestaĵoj, juna virino sin klinas inter la bluaj, flavaj, ruĝaj kolortonoj, en la surterigita korbo ankoraŭ abunde estas pendigendaĵoj, vesto lavita, infano ludadas apud la korbo, knabino en ruĝa kaptuko, kaj la diligentulojn rigardas kontente juna viro sur disetenditaj kruroj — domaĝe, lian vizaĝon mi ne vidas, li montras al mi sian dorson.

Nu, turniĝu jam, Kotróczi! — mi povu vidi, kia vi estas?

— Kaj kial vi ne pensas pri Mednyánszky? — mi ŝercprovokis min. — Kaj se via Kotróczi estas drinkema vagabondo? Eble li jam elpeliĝis de la juvelista metio kaj nun estas ŝarĝportisto, mizerulo? Kial ne?

Ĉe tiu penso mi devis ĉesigi la ludon, mi staris antaŭ la domo de Kotróczi. Ĝia duono estis kamparana domo, la alia parto estis konstruaĵo servile imitanta villon. El la malgranda antaŭĝardeno mi atingis vitroŝirmitan verandon, mi frapsignis, denove frapetis, kaj fine ankaŭ trian fojon. Neniu sin anoncis. Mi ne havas bonŝancon. Ŝajnas al mi, ke ili ne troviĝas hejme.

Mi ĝuste volis transiri al najbara domo, kiam de malantaŭ la domo venis virino. Ŝi estis ankoraŭ juna, sed jam sufiĉe trivita. Ŝi jam naskis certe kvar-kvin infanojn, kaj la duonon ankoraŭ antaŭ *la karto*. Antaŭe, sur la longa blua antaŭtuko ŝi surhavis ankaŭ kunligitan viŝtukon — estis videble, ke ŝi aŭdis mian frapetadon dum lavado ie malantaŭe en la korta lavejo.

— Kiun vi serĉas?

Kian sentonan, grizan voĉon ŝi havis! Kvazaŭ ankaŭ tiu voĉo estus jam plurfoje prilavita en forte sodigita akvo per grasaj sapoj — tiun virinon pentris nek Chardin, nek Szinyei-Merse. La fono malhavis la brunecan bonstaton, ankaŭ el la helo al ni



Sándor Kürthy: Duope

falanta ne lumis bluaj-ruĝaj buntaj koloroj. Kiun mi serĉas! Do lin.

— Mihály Kotróczi.

La virino tiel same pririgardis min kiel la kelnero en la kafejo. Longe ŝi rigardis, nur poste demandis:

— Ĉu Kotróczi?

Mi devis ripeti la nomon, al mi mem jam plurfoje eldiritan, sed laŭte nur nun la duan fojon.

— Jes, lin, Mihály Kotróczi.

La virino min rigardis tiel rigide, ke dume ŝi eĉ ne palpebrumis.

— Ĉu vi konis lin?

— Ne.

— Do, kial vi lin serĉas?

Kiel komenci?

— Mi volus ion rakonti al li... — por momento mi haltis. — Certe lin interesus. Kaj eble ankaŭ vin...

Sed mi ne povas disvolvi al ŝi la tutan aferon ĉi tie, antaŭ la verando. Kaj eble ŝi eĉ ne estas lia edzino — ankaŭ tion mi devos demandi.

Sed ŝi antaŭis min.

— Ne eble.

— Kio ne eble?

— Vi ne povos paroli kun li.

— Kial?

— Ĉar li mortis.

La domo, la ĝardeno kaj la virino turniĝis kun mi.

— Ĉu ankaŭ vi venis de tie, el Ukrainio? — mi aŭdis ŝian voĉon de malproksime.

— Ne.

— Tiuokaze de kie vi scias lian nomon?

Ŝiaj okuloj plirondiĝis. Kaj spiteme, persiste ŝi komencis min konfesigi, kiel la sovaĝbesto aŭdas la ankoraŭ neaŭdeblajn, se ĝi jam kaptis odorsignon.

— De la kontoro de la regimento.

— Kaj kian aferon vi havis tie pri li?

— Nenian.

— Tamen vi konas lian nomon pro io.

— Mi vidis sur karto. Estas nekutima nomo, mi encerbigis ĝin.

Sed ŝin interesis la karto kaj ne la nomo.

— Sur kia karto?

— Sur la kadro-karto.

— Ĉu ĝi estis en via mano?

— Jes, foje mi havis ĝin enmane.

Dum certa tempo ŝi rigardadis.

— Kaj vi sendis al li. — Post kelkaj momentoj ŝi ripetis. — Vi alpoŝtigis ĝin al li.

Tion ŝi ne demandis, sed eldiris en la plej griza tono. Kaj kiel ŝi diris, en la voĉo ne estis jam doloro, nek flamis en ĝi akuzo, minaco, nek emocio, tiu frazo jam ne havis eĉ enhavon, ĉar el la vortoj tiel same mankis jam la vizaĝo de Mihály Kotróczi, kiel ĝi ne aperis en la imagitaj pentraĵoj de Chardin, Szinyei-Merse kaj Mednyánszky.

Ŝi nur ripetis:

— Vi sendis ĝin al li.

— Mi ne! — mi protestis.

— Ankaŭ vi.

— Mi fakte ne!

— Kaj kion vi faris tie?

Mi elpoŝigis la karton.

— Vidu, jen estas lia kadro-karto. Mi ellevis ĝin, por ke oni ne sendu al li kunvok-ordonon. Kaj nun mi alvenis por lin ekkoni. Ĉu vere li mortis?

Eĉ por unu rigardo ŝi ne trovis inda la karton. Eble ŝi eĉ ne komprenis, kion mi montras al ŝi.

— Li mortis.

— Do, ĉu li soldatiĝis memvole?

— Li ricevis kunvok-ordonon.

— Mi ne komprenas... Ĉe mi estas lia karto, neniu povis skribi al li kunvokilon.

— Tamen li ricevis.

— Kiu ĝin sendis?

— Tion mi ne scias. Li estis forsendita al Ukrainio, kaj tie li mortis.

Mi staris senpove antaŭ la virino: rigidiĝanta ligno-skulptaĵo.

— Ĉu vi rememoras, kiam li ricevis ĝin?

Ŝi sciis precize.

— Printempe de kvardek du.

Denove turniĝis kun mi la mondo.

Ĉu printempe? Mi ellevis tiun blankan karton aŭtune de la sama jaro. Duonjaron post tio, ke iu skribisto kopiis la nomon de Mihály Kotróczi, la adreson, kaj ankaŭ tion li surpaperigis, kie kaj kiam li devas aperi.

La virino tiam etendis al mi la manon:

— Mi nomiĝas Mihályedza Nagy.

Por adiaŭo ŝi donis la manon, ŝin atendis la lavotrogo. Sed mi ne delasis la manon de sodo eroditan.

— Ĉu mi ne parolis kun sinjorino Mihályedza Kotróczi?

— Jam Mihály Nagy estas mia laŭleĝa edzo.

— Ĉu vi denove edziniĝis?

Tion mi demandis kiel ofendito.

— En la jaro kvardekses.

Ŝi returniĝis, ne havis jam plu demandi, reiris malantaŭ la domon.

***

Mi havis ankoraŭ kvin horojn en N. Sed eĉ kvin minutoj ne necesis por solvi tiun sovaĝan, krudan, timigan enigmon: en la kontoro de la regimento iu nezorgeme lasis la karton de *envokito* inter tiuj de *envokenduloj,* kaj ĝuste tiun blankan karton, ĝuste tiun unusolan mi ellevis el inter la pluraj mil kaj mil.

Aŭ eble iu mia antaŭulo — pro satana koro — la *envokitojn* intence lasis inter la *envokenduloj:* se ili tamen hazarde realvenus hejmen, ili ricevu kunvokilon denove, duan kaj trian fojon, plej baldaŭ. Kompreneble, por fari tion, estis necesa ankaŭ tio, ke la *spikumanta* serĝento dormu.

Ĉar ĉu Kotrózci estis la sola enforgesito, — la unusola?

Kiu povas scii?

Inter varmegaj vorticoj pasas nia vivo.

Trad.: Márton FEJES

Glosoj:

— *Brakpasamentuloj*[1]*:* — En la antaŭmilita, faŝisma hungara reĝimo mezlernejon fini povis ĝenerale nur idoj de burĝaro kaj de aliaj superaj klasoj. La armeo donis al tiuj avantaĝojn, ekz.: ili devis servi nur unu jaron, havis eblecon oficiriĝi, ktp. Surbrake ili portis pasamenton kiel distingilon.

[2]: — En la hungara lingvo la vortoj signifantaj verkiston kaj skribiston devenas el sama radiko kaj havas formon similan. (író, írnok)

[3]: — Malfacile tradukeblaj (kaj ĝenerale ne tradukendaj) familiaj nomoj, havantaj signifon de plimalpli ridinda, moka efiko, ekz.: Odoraĉa, Pulhava, Fekuma, ktp.

[4]: — En la hungara lingvouzo la persona pronomo" „te" (singularo, dua persono) havas grandan signifon, bone distingeblan sencon. Tiu pronomo — en la teksto tradukita per „ci" — estas uzata precipe inter familianoj, amikoj, kolegoj kaj signas intiman interrilaton.

Hungario-muziklando

Hungario estas konata kiel muzikema lando. Eĉ pli — kiel muziklando. Kaj fakte: Niatempe en ĉiu parto de la mondo mondfamaj hungaraj muzikistoj estas troveblaj.

Ĉi tio pruvas, ke la muzika edukado estas jam malnova tradicio en nia malgranda lando.

Post la liberiĝo el sub la faŝisma jugo Hungario konstruis novan sociordon, la socialismon, kiu pli ol iam-ajna registaro subtenas kaj protektas la estetikan-artan kulturon; estas ja klare, ke la vera ĝuo de la artoj apartenas al la kapabloj de la integra homo.

Hungario havas eĉ socialisman tradicion koncerne la apogon de la arta kulturo kaj edukado: en la jaro 1919 fondiĝis ĉi tie ŝtato de komuno kaj dum la mallonga periodo de ĝia regado multaj muzikkulturaj problemoj trovis solvon, kaj fariĝis ekzemplo por la nuntempa hungara kulturpolitiko.

Estas evidente, ke leganto de revuo ne emas legi multajn statistikajn indikojn. Mi pensas tamen tre interesaj kelkajn nombrojn, kiuj donas ideon pri la granda kvalita salto, okazinta en la nove naskiĝinta Hungario.

Antaŭ la liberiĝo ekzistis en Hungario nur unu filharmonia orkestro; hodiaŭ ni havas 13. La solistoj de la orkestraj ensembloj ricevas regulan salajron, do eĉ se ili ne laboras aliloke (ekzemple kiel profesoroj ĉe muzikaj lernejoj ktp) ilia vivteno estas certigita.

Antaŭ 1945 en la tuta Hungario ekzistis nur unu operdomo. Nun Budapeŝto havas du, kiuj ludas ĉiutage, do la muzikamanto povas ĉiam elekti inter du artaj muzikaj teatroprezentadoj. Ekster Budapeŝto ekzistas ankoraŭ 3 operdomoj, ludantaj en 25 urboj. Tiamaniere la altnivela muzika kulturo nuntempe estas ĝuebla en multaj urboj, en kiuj antaŭe nenia tia eblo ekzistis.

Jam plurfoje mi aŭdis la onidiron, ke la eduka preparo de la klasikaj komponistoj, la ĥoraj lernejoj, kroĉitaj al grandaj katedralaj ĥor-ensembloj, ebligis al la muziktalentaj junuloj jam en la frua juneco ekkoni la altnivelan muzikon, ne nur praktike, sed ankaŭ teorie. Mondfamaj estis la ĥor-ensembloj de la Viena katedralo de Sankta Stefano, de la Drezdena Kruca Katedralo, de la Tomasa katedralo de Leipzig, ne malpli la Filharmonia Societo de Romo. En la Viena ĥor-ensemblo ricevis muzikan edukadon la geniuloj Jos. Haydn kaj Fr. Schubert kaj multaj aliaj, kiuj signas la historian gravecon de ĉi tiuj institucioj.

En Hungario la ebloj fariĝi bona faka muzikisto estas multe pli vastaj. Nia lando havas 140 muzikfakajn ĝeneralajn lernejojn. Pli ol 40 000 lernantoj lernas ne nur la ĝenerale preskribitajn lernobjektojn tie, sed krome ili okupas sin pri muziko, instrumenta kaj kanta.

Karakterize por la pozicio de la hungara muzikkulturo estas, ke la Muzika Altlernejo „Francisko Liszt" ricevis universitatan rangon; la profesoroj ricevas salajron kaj rangon de universitataj profesoroj kaj la studentoj, finintaj la Altlernejon, ricevas universitatan diplomon.

En la Muzika Altlernejo lernas kaj studas ne nur praktikaj muzikistoj, sed ankaŭ muziksciencistoj. La hungaraj muziksciencistoj — profesoroj kaj adeptoj — jam havas mondfamon. En Hungario la gazetaj kaj aliaj muzikkritikoj estas verkataj de ekspertoj, kiuj ricevis sisteman muziksciencan edukadon.

La gramodiskoj hungaraj jam estas konataj ĉie, kie oni ŝatas muzikon. Multnombraj diskoj ricevis kaj ricevas altrangajn internaciajn premiojn en ĉiu parto de la mondo. Estas menciinde, ke la triono de la gramodiskoj, fabrikataj en Hungario, apartenas al la arta muziko — kaj ilin oni vendas grandparte en la lando. Ĉi tiu indiko mem estas multsignifa fakto, kiun ne en ĉiuj landoj oni povas konstati.

Apartan atenton oni devas dediĉi al la amatora muzika agado, ĉar ĝi certigas la komprenantan, fidindan muzikpublikon. Antaŭ ĉio estas interese, ke en Hungario pli ol 5000 amatoraj ĥoraj ensembloj ekzistas, kiuj pliriĉigas la muzikkulturon, edukas al la ĝuo de bona muziko en la tuta lando, eĉ en tre malgrandaj vilaĝoj.

Certe ne estas hazardo, ke hungaraj ĥor-ensembloj en ĉiuj internaciaj ĥor-konkursoj gajnas almenaŭ 1—2 altrangajn premiojn.

La kultura vivo ĝenerale kaj la muzikkulturo aparte havas la socian taskon doni homan kvaliton al la homa esto. Estas fakto, ke sen kultura vivo, sen ĝuo de la artoj, la homo povas trairi sian vivovojon; sed tute ne egalas, ĉu ni iras nian vojon tra dezerto aŭ tra multflora ĝardeno — precipe, se la irado sur la vojo estas nia ĉefa celo.

Pliriĉigi la vivon, fari ĝin vere homeca — jen la destino de la artoj kaj inter ili de la muziko. En ĉi tiu tereno Hungario klopodas plenumi sian parton kaj la ĝis nun atingitaj rezultoj pruvas ke ĉi tiu malgranda lando vere taksas ĉi tion sia devo kaj faras ĉion kio eblas al ĝi.

Lajos LESZNAI

La kultura stato de la naciaj minoritatoj en Hungarlando

La kulturkomisiono de la hungara parlamento tenis kunsidon en la sudprovinca urbo Békéscsaba. Ĝin partoprenis ankaŭ la ĉefsekretarioj kaj gvidantoj de la minoritat-federacioj.

Vicministro de la kulturministerio, József Garamvölgyi enkonduke substrekis, ke *la minoritatoj des pli forte povas politike identiĝi kun la majoritata hungara popolo kaj ties gvidantoj, ju pli ili sentas certigitaj la liberan validiĝon de la konservado de siaj naciaj kulturo kaj specifaĵoj, la uzadon de sia propra lingvo, la realiĝon de siaj instrupretendoj kaj la ligiĝon al la nacio parolanta la saman lingvon.*

Le ĝenerala bildo ĉi-terene estas ĝojiga. Koncerne la instruadon: la nombro de la infanĝardenoj, bazaj lernejoj kaj gimnazioj, kie oni instruas ankaŭ en la minoritataj lingvoj, plialtiĝis dum la lastaj 5 jaroj preskaŭ je 40%-oj, la etato de la naciecaj pedagogoj altiĝis je 47%-oj. Trioble pli estas la nombro de la infanĝardenoj kaj kvaroble pli da infanĝardenistinoj okupiĝas kun la infanoj. Ekzistas ĉe ni bazaj lernejoj, kie escepte la minoritatan lingvon, oni instruas la studobjektojn hungarlingve. Sed funkcias ankaŭ dulingvaj bazaj lernejoj, kie oni instruas, ĉirkaŭe en egala proporcio, hungare kaj en la alia lingvo. Interese, ke 81,8%-oj de la lernantoj apartenantaj al minoritataj nacioj, preferas la lernejon, kie la instruado okazas ĝenerale hungarlingve. Tamen, tiuj diversaj tipoj de la bazlernejoj ne estas ankoraŭ definitivaj formoj, male, oni jam de jaroj eksperimentas pri pli modernaj minoritataj bazaj lernejtipoj.

Kaj kiel statas la afero en la gimnazioj? En Hungarlando funkcias nuntempe po unu sendependa gimnazio kroata-serba, germana kaj rumana, po du sendependaj slovakaj kaj germanaj gimnazioj. En ili la instruado estas dulingva: la tn. realajn studobjektojn (matematiko, fiziko ks.) oni instruas hungare, la ceterajn (literaturo, historio ks.) en la lingvo minoritata. Malfacilaĵon kaŭzas, ke ni ne havas ankoraŭ sufiĉe da studenthejmoj.

Resume: en la kultura vivo de niaj naciecoj vere realiĝas la socialisma principo: *ne sufiĉas nura laŭleĝa deklaro pri la egalrajteco de la minoritatoj, sed la socialisma ŝtato devas ankaŭ fakte certigi la egalrajtecon per tio, ke ĝi forigas de antaŭ la evoluo la obstaklojn, kiuj objektive estiĝas el la pozicio minoritata.*

T.: J. MÁTÉFFY

Kiel laboras la Mondasocio de Hungaroj.

Eksterlandaj hungaraj knabinoj sur la Gellért-monto

Estas konate de multaj, ke nia patrio estas malgranda lando: nia nuntempa loĝantaro nombras 10 200 000. Sed krome multaj hungaroj vivas ĉirkaŭ ni en la socialismaj landoj kaj konsiderinda estas la nombro de tiu hungararo, kiu loĝas en Okcident-Eŭropo kaj en aliaj kontinentoj. El inter la ĉirkaŭaj socialismaj landoj ni scias pri 400 000 hungaroj en Ĉeĥoslovakio, 160 000 en Sovetunio, 1 600 000 en Rumanio kaj 510 000 en Jugoslavio. Ili ĉiuj estas niaj rektaj najbaroj, kiuj facile kaj regule povas kontaktiĝi kun Hungario. Kvankam ili formas etnan minoritaton en sia lando, tamen ili ĝuas tie egalrajtecon, kaj krome ili havas ankaŭ sian propran reprezentadon de interesoj. Tute alia estas la situacio en la kapitalismaj landoj, kie la elmigrintoj vivas en relative malgrandaj blokoj, sekve ili ne tiel facile povas kontaktiĝi kun la malnova patrio. Inter ili pli granda estas la transforma efiko de la nova hejmo ankaŭ el vidpunkto de la gepatra lingvo. Pri la kontaktoj kun tiuj hungaroj zorgas la Mondasocio de Hungaroj.

La elmigrado al la okcidentaj landoj komenciĝis je la fino de la antaŭa jarcento. La prema labormanko, reganta tiam en nia patrio, devigis centmilojn da hungaraj laboristoj kaj kamparanoj elmigri al Okcidento precipe al Ameriko. Tiu elmigrado daŭris ankaŭ post la unua kaj dua mondmilitoj, poste en 1956. Laŭ niaj indikoj nuntempe ĉ. 250 000 hungaroj vivas en diversaj kapitalismaj landoj de Eŭropo. Sur la Amerika kontinento proksimume unu miliono, el tiuj 770 000 en Usono, 120 000 en Kanado. 40 000 vivas en Aŭstralio, 180 000 en Afriko, Azio kaj ĉ. 140 000 dise en aliaj landoj de la mondo.

Resume ni povas diri, ke el la ĉ. 14-miliona hungararo proksimume 4 milionoj vivas ekster nia patrio kaj el ili ĉ. 1,5 milionoj en la kapitalisma parto de la mondo. Kompare al la 10-miliona enlanda loĝantaro de Hungario, tiu nombro estas tre alta kaj signifas ankaŭ tion, ke preskaŭ ĉiu hungara familio havas familianon, parencojn, amikojn, konatojn en eksterlando.

La registaro de la Hungara Popolrespubliko komprenis kaj konsciiĝis, ke la granda parto de niaj samlandanoj vivantaj en Okcidento tie enradikiĝis, akiris ekzistrimedojn kaj ke ankaŭ familiaj kontaktoj ligas ilin al la nova patrio. Niaj leĝoj rekonas la duoblan ŝtatanecon: iu povas esti bona ŝtatano de la akcepta lando kaj samtempe ligiĝi ankaŭ al la socialisma Hungario. Kiu decidas tiel, ke li volas hejmenveni definitive, tiun ni akceptas bonvenige, sed ni faras nenian facilaniman ludon kun la vivo de homoj, ni ne propagandas por revenigi iun.

La Mondasocio de Hungaroj, kiel socia unuiĝo, simbolas, ke la afero de la elmigrado estas problemo naci-signifa, tutsocia afero. En la prezidantaro de la Mondasocio havas lokon la reprezentantoj de la Patriota Popolfronto, la Tutlanda Konsilio de la Sindikatoj, la Virina Konsilio, sportuloj, junularo, diversaj eklezioj kaj la Hungara Scienca Akademio. Krome pluraj elstaraj scienculoj, artistoj, publikaj funkciuloj de la lando, inter ili ankaŭ tiuj, kiuj ankaŭ mem vivis kelkan tempon en emigracio.

La ĉefa tasko de la Mondasocio de Hungaroj estas la konservado kaj flegado de la kontaktoj kun la elmigrintoj. La gazeto de la Asocio, la „Magyar Hírek" (Hungaraj Informoj) fariĝis populara presorgano. Ĝi frapetas ĉiun duan semajnon je la pordo de niaj samlandanoj, vivantaj en iu ajn parto de la mondo, aperante en 86 000 ekzempleroj. Multaj aŭskultas la disaŭdigon de la Hungara Radio sub la titolo „SzülőföldünkÓ" (Nia Naskolando).

Alia ĉefa tasko de la Asocio estas kunlabori por konservi la hungaran kulturon, la gepatran lingvon inter la elmigrintoj, aliflanke konigi la vivon de la hodiaŭa socialisma Hungario al la eksterlandaj hungaroj.

La centoj de la hejmenvizitantoj turnas sin al la Mondasocio de la Hungaroj en diversaj aferoj, petas informon, aŭ helpon. Preskaŭ ĉiun tagon oni deziras informiĝi el la diversaj regionoj de la mondo: kiel okazas la hereda procedo, kiaj estas la dogan-reguloj, kiel oni povas loksidiĝi en Hungario, k.t.p.

En 1964. Usonaj hungaroj savis la vivon de knabineto el la urbo

Dancgrupo de la Viena Hungara Kultur-Asocio

Baja. Ŝi bezonis specialan operacion, kiun oni faris tiutempe nur en la Usona urbo Cleveland. La Mondasocio de Hungaroj kaj la Ruĝa Kruco konsiderinde kontribuis por tio, ke la malsana knabineto povu elvojaĝi kun sia patrino.

Grandsignifaj estis tiuj gepatralingvaj konferencoj, kiujn oni aranĝis — laŭ la iniciato kaj per la patronado de la Mondasocio — en 1970. en Budapeŝto kaj en 1973. en Szombathely. Tiuj konferencoj celas la konservadon kaj kulturadon de la hungara lingvo, ĉefe por tiuj, kiuj jam delonge forsiriĝis de la patrolando, aŭ, apartenante al la dua, tria generacio, volas refreŝigi sian lingvoscion, aŭ lerni la hungaran lingvon. Multaj el la iamaj studentoj de la famekonata kolegio en Sárospatak pasintjare venis eĉ el trans la oceano, por viziti la karan „Alma Mater".

En 1973. — je la datreveno de la naskiĝo de nia granda poeto Petőfi — ni solenis kune kun la hungaroj vivantaj eksterlande.

Konstante grandiĝas la nombro de tiuj, kiuj, vizitante la forlasitan patrion, serĉas la kontakton kun la ĉi tie restintaj apartenuloj. Dum la lastaj 4 jaroj pli ol 500 000 eksterlandaj hungaroj vizitis nian patrion.

Ĉi-jare, je la 30-a jubileo de nia liberiĝo, ankaŭ la eksterlandaj hungaraj societoj kaj kluboj preparas sin partopreni la jubileajn festojn.

En 1973. — helpe de la Mondasocio de Hungaroj — 160 el niaj artistoj vizitis 17 urbojn de 9 okcidentaj landoj kaj aranĝis tie 41 prezentadojn. Tiujn prezentadojn partoprenis ĉ. 10 000 spektantoj. La Mondasocio krome helpas plurajn eksterlandajn societojn per hungaraj filmoj, libroj. Por dancensembloj ĝi sendas koreografiojn, dancvestaĵojn, fakulojn, k.t.p.

Por la 15—20-jaraj junuloj la Mondasocio kontinue aranĝos 4-semajnan someran seminarion en la Kolegio de Sárospatak, kie ili povos konatiĝi kun la hungara lingvo, literaturo, historio kaj viziti la hejmajn pejzaĝojn. Por la pli junaj oni estigos samtempe eblon de ripozo apud la lago Balatono.

El niaj famaj granduloj antaŭ nelonge vizitis nian patrion la fortepianistoj Géza Anda kaj György Czifra kaj la violonartisto, György Pauk. Pri la vizito de nia Nobelpremiita bioĥemiisto Albert Szent-Györgyi ni raportis antaŭ nelonge en HV.

Kiam la hungara registaro elformis la nunan, longdaŭran strategian politikon koncerne la elmigrintojn, grava vidpunkto estis, ke en normala internacia etoso la eksterlandaj hungaroj povas esti ponto inter la akcepta lando kaj la kulturaj, ekonomiaj, politikaj cirkonstancoj de la patrolando. Tial funkcias, helpas kaj peras la Mondasocio de Hungaroj, ke ĉiuj, kiuj vivas malproksime de nia patrio, sed konfesas sin hungaroj, parolas kaj pensadas hungare, ĉiam sentu la zorgemon kaj helpopretecon de la forlasita patrolando.

István LÁSZLÓ

Komuniko

pri la 7-a Konsultiĝo de reprezentantoj de Esperanto-asocioj kaj movadoj en socialistaj landoj.

En la tagoj de 29-a de Marto ĝis la 1-a de Aprilo 1975 okazis en Melnik (apud Praha — Ĉeĥoslovaka Socialisma Respubliko) la 7-a konsultiĝo de reprezentantoj de Esperanto-asocioj kaj movadoj el: Bulgario, Ĉeĥio, Slovakio, GDR, Hungario, Pollando kaj Sovetunio.

La Konsultiĝo traktis la formon kaj metodon de plua kunlaborado de la reprezentitaj organizaĵoj por la plibonigo de l' stato de la esperantista agado en la koncernaj landoj kaj en la internacia Esperanto-movado.

La Konsultiĝo aparte okupiĝis pri la taskoj de la koncernaj Esperanto-organizaĵoj lige kun la proksimiĝanta 30 jara jubileo de la venko super la faŝismo en la dua mondmilito.

Ankaŭ la Internacia Jaro de la Virino estis diskutita por esplori plej taŭgajn formojn de partopreno fare de la respektivaj Esperanto-organizaĵoj en tiu tutmonda aranĝo.

En la diskutoj pri la neceso de sciencaj esploroj el marksisma vidpunkto de la problemoj de internacia lingvo kaj pli speciale de Esperanto la partoprenintoj notis kun granda kontento la fondiĝon de Problema grupo pri la demando de internacia helplingvo ĉe la Instituto por Lingvistiko de la Soveta Scienc-akademio. La Konsultiĝo turnas sin al la komisiono por Internaciaj Ligoj de Sovetaj Esperantistoj kun propono fari necesajn paŝojn por organizo de la 9-a Konsultiĝo en Moskvo, lige kun la 60 jara jubileo de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio (1917—1977). La loko kaj dato de la 8-a Konsultiĝo estos definitive fiksitaj post esploro de iuj teknikaj cirkonstancoj.

Melnik (Praha), la 1-an de Aprilo 1975.

panoramo

Malnovaj naciaj kostumoj en Sárbogárd

Pasintjare, la 21-an de novembro pasis dek jaroj de post la inaŭguro de la *Elizabeta ponto*, fierajo de nia ĉefurbo. (Vidu la titolpaĝon.) Tiu svelta ponto naskiĝis tiam duafoje: la antaŭa Elizabeta ponto pretiĝis en 1903, la 10-an de oktobro. En tiu sama loko kiel la nuna, ĝi transpontis la riveron Danubo en 290 metrojn longa arko. La arkon tenis pezaj ĉenoj el fero, la propra pezo de la ponto estis 11 mil tunoj. Ĝian ŝtalstrukturon faris la hungara fabriko MÁVAG laŭ la planoj de la maŝinfabriko en Esslingen. 41 jarojn vivis tiu ponto, ĝis en 1944 la germanaj faŝistoj ĝin eksplodigis, kune kun la kvin aliaj pontoj Danubaj. Dum 20 jaroj kuŝis la korpo de la ponto en la ondofrapado de la Danubo, intertempe la aliaj pontoj jam estis restarigitaj, sed al ĝi, la plej svelta, plej aŭdac-arka, venis la vico laste: en 1964 ĝi reviviĝis laŭ la planoj de inĝeniero *Pál Sávoly*. Kaj ĝi fariĝis ankoraŭ pli svelta: ĝi pezas nur 6800 tunojn kaj anstataŭ la ŝtalĉenoj ĝin tenas ŝtalkabloj. Ĝin konstruis ree la hungara fabriko MÁVAG. Ĝia reviviĝo estis siatempe kvazaŭ popolfesto, kvazaŭ persona donaco por ĉiu budapeŝtano. La nova, 10-jara, blankvestita fraŭlino „Erzsébet" estos espereble dum multa-multa tempo sekure la fierajo de Budapeŝto.

***

La Internacia Komputer-teknika Instrua-Informa Centro *kaj la Evoluiga Programo de UNO tenas komunorganize dumonatan internacian programprojektan kurson en Budapeŝto. Lastatempe konvencio estiĝis inter la hungara registaro kaj la Evoluiga Programo de UNO pri kunagado de diversnaciaj fakuloj dum kvinjara periodo en Budapeŝto. La unua aktivado estas la jam menciita dumonata kurso, kies oficiala lingvo estas la angla. En la kurso ricevas orientadon unuavice partoprenantoj el la evoluantaj landoj. Multnombra anonciĝo indikas, kiel grava estas la komputer-tekniko en la moderna mondo. Ankaŭ la hungara libroeldonado helpas la kurson per novaj faklibroj, ekz-e „La programlingvo de la komputero Cobol" de Gyula Lőce, „La programlingvo de la komputeroj Algol kaj Fortran" de I. Flores, „La sistemtekniko de modernaj komputeroj" de M. F. Wolters kaj „Ŝlosilo por komputeroj".*

***



Aurél Stein

Tamio Kameko *japana scienculo verkas libron pri la fama hungara Hinduj-esploristo* Aurél Stein. *Li jam eldonis libron pri alia fama Azio-esploristo* Sven Hedin *kaj nun petis informan materialon de la Hung. Scienca Akademio pri Aurél Stein. Li ricevis la libron de Vilma Boros kaj anglalingvan resumon de la libroj de Gy. Halász, B. Bevilaqua kaj L. Rásonyi. Aurél Stein naskiĝis en Pešto la 26-an de nov. 1862. Kiel junulon, lia plia aĝa frato kunvenigis lin al Dresden, por ke li lernu germane, sed la abiturientan ekzamenon li faris en Pešto (1879) tiel eminente, ke li ricevis stipendion por studi en Leipzig, Oxford kaj London. Fine la ŝtato donis al li subtenon, por ke li povu forveturi al Hindio (1887). Li laŭiris la iaman vojon de Aleksandro la Granda, tiun de la ĉina pilgrimanto Hsian Čang kaj tiun de la hungara Sándor Kőrösi Csoma. Li fariĝis angla civitano, akiris lordan titolon kaj diverslandajn doktorecojn, sed li ĉiam konfesis sin hungara. Li mortis en 1941 ĉe ekspedicio en Kabul.*

panoramo

En la *libroeksportado* de la mondo, Hungario — laŭ la indikoj de UNESKO — troviĝas en la mezo inter 127 landoj. Nun la hungara Unuiĝo de Libroeldonejoj kaj Librokolportejoj eldonas por propagando librodemonstran revuon kvaronjaran en 12 800 ekzempleroj; la ĉefredaktoro estas *György Gera*. La titoloj de la revuo estas laŭ la lingvoj: *Le Livre Hongrois, Hungarian Book Rewiew, Bücher aus Ungarn;* la abonantoj estas precipe sciencaj institutoj, universitatoj, bibliotekoj, libroeldonejoj, verkistoj. Tiamaniere de Svisio ĝis Japanio milionoj da legantoj povas ligiĝi al la hungara literaturo en la grandaj bibliotekoj. Dank' al la revuo, la hungara Aŭtorrajto-defenda Oficejo ricevas multajn mendojn pri tradukigo de hungaraj libroj en la anglan, francan, germanan. Inter la abonantoj troviĝas Claude Roy, Peter Weiss, Heinrich Böll, Barbara Frischmuth, Kipphardt kaj aliaj verkistoj kaj kritikistoj, la Chase Manhattan Bank, la biblioteko de State Department kaj tiu de Biennale en Venecio.

***

Gyula Illyés, la konata hungara verkisto skribis, ke en la mondo nuntempe vivas 15 milionoj da homoj, kiuj perfekte parolas sian gepatran lingvon, la hungaran. La liter-malsato de tiuj 5 milionoj, kiuj vivas ekster la limoj de Hungario, estas grandega. Por ilin kontentigi, la hungara ŝtato faris interlandan kontrakton kun Rumanio. Ĉeĥoslovakio kaj Jugoslavio pri komuna libro-eldonado. El la kontraktoj rezultis komuna laboro kun la avantaĝo, ke oni evitas paralelajn eldonojn: la librojn en unu lando presas por la legantoj de ambaŭ landoj. En Rumanio la libroeldonejoj Kriterion, Dacia, Albatros *kaj* Eminescu *aperigis hungarlingve pli ol cent librojn de hungaraj verkistoj vivantaj en Rumanio, ekz-e de István Asztalos, Gábor Gaál, Edgár Balogh, György Kovács, József Méliusz, István Nagy. En Ĉeĥoslovakio funkcias en Pozsony (Bratislava) la libroeldonejo* Madách, *kiu aperigis hungarlingvajn librojn de Zoltán Fábry, Viktor Egri, Imre Forbáth, Olivér Rácz, László Dobos kaj aliaj. En Jugoslavio la libroeldonejo* Forum *en Újvidék (Novi Sad) aperigas jare 20 hungarlingvajn librojn.*

***

En Budapeŝto, en la urboparto Pesterzsébet, la pentristo *István Pál Nolipa* ekspoziciis siajn pentraĵojn en la tiea Muzeo. Nolipa, e-isto de pluraj jardekoj, estas emerita soldatoficiro kaj ano iama de Grupo de Socialistaj Belartistoj. Lastfoje en 1970 lia pentraĵekspozicio havis lokon en la ĉefurba Nacia Galerio. De tiam li kreis multajn grafikaĵojn, kolorajn, tuĉajn desegnaĵojn kaj oleopentraĵojn. Lia ĉiama ĉeftemo estas la urbobildoj. De Prago ĝis Venecio, de Romo ĝis Toledo, la tieaj konataj konstruaĵoj, la ĉiutaga vivo kaj ties momentoj kvazaŭ vivas sur liaj bildoj. Liaj oleopentraĵoj dividiĝas en tri diversajn specojn. La plej belaj estas la urbobildoj pri Budapeŝto; en ili sinteziĝas surrealisma formaleco kun tradicia realisma stilo. Al la dua speco apartenas la surrealismaj-alegoriaj pentraĵoj prezentantaj sintenojn homajn. La tria speco kondukas nin sur la malfacilan terenon de skemisma stilo, kiu konsternas la rigardantojn per grandforta figurado de laboro kaj konstruo.

***

Pri la hungaraj popolartoj *lastatempe pluraj interesaj ekspozicioj estis malfermitaj. En* Vieno, *en la tiea „Collegium Hungaricum", riĉa ekspozicio, kun la titolo*

Valora pentraĵo el Budapeŝta Belarta Muzeo Maljuna Lucas Cranach: La adultulino

„Centjara estas la Artindustria Muzeo Budapeŝta", montris belan materialon juvelistan, ceramikan kaj teksan. En Berlino, *en la „Domo de la Hungara Kulturo" popolarta ekspozicio estis tenata, kie potfaristaj artaĵoj, teksitaj kovriloj, brodaĵoj kaj lignoskulptaĵoj estis videblaj; grandan sukceson rikoltis tie ankaŭ la foto-dokumentado pri la 25-jara interrilato de la popoloj hungara kaj orient-germana. En* Varsovio, *en la Hungara Instituto, kvin junaj hungaraj grafikistoj prezentis sin per interesaj grafikaĵoj. En Suda Ameriko, en* Venezuelo *okazis Hungara Kultura Semajno, dum kiu en vastasfera ekspozicio oni prezentis la laboraĵojn de hungaraj ceramikistoj, teksartistoj kaj juvelistoj. La hungaran libroeldonadon reprezentis 300 diversfakaj libroj, donacitaj de la hungara ŝtato al la Scienca Universitato en la ĉefurbo Caracas.*

***

En *Hindunio,* en la Universitato de *Delhi,* formiĝis katedroj de eŭropaj lingvoj, inter ili ankaŭ de la hungara; la lektoro de la hungara fako estas *György Vágó.* En la unua jaro li havis nur 5—6 lernantojn, sed en 1974 ili jam plimultiĝis je 35. Kompreneble, la hungara katedro ne povas konkuri kun franca, germana, hispana, itala, rusa; tamen, estis granda sukceso, kiam aperis poemvolumo de nia poeto Sándor Petőfi en la lingvoj hindia kaj angla. La hindoj parolas krom la hindia lingvo plurcent aliajn lingvojn, precipe la bengalan, guĝaratan, panĝaban, tamilan kaj teluguan. La lernantoj trovas la hungaran lingvon tre „ekzotika", tamen lernas diligente el la libro „Learn Hungarian", helpe de prof. Vágó kaj lia edzino. Pasintjare en la Universitato oni aranĝis Petőfi-feston en kiu la lernantoj brilokule deklamis hungare kaj en diversaj Hinduniaj lingvoj Petőfi-poemojn.

***

La kunaga organizaĵo „Intermetall" akordigas la metalurgian aktivecon de la socialismaj landoj. La organizaĵon fondis Ĉeĥoslovakio, Hungario kaj Pollando en 1964, kaj en la sama jaro aliĝis Sovetunio, Germana DR kaj Bulgario. Kontrakton faris kun ĝi la Jugoslavia Metalurgia Uzina Unuiĝo en 1968 kaj la Rumania ŝtata entrepreno Metal-import-export en 1970. La granda organizaĵo okupiĝas pri la specialigo de la metalurgia produktado, organizas la interŝangon de la metalurgiaj produktaĵoj, certigas la fruktuzon de la produkto-kapabloj, akordigas la mastrumon de la produktaĵoj, preparas komunajn investadojn, zorgas pri interŝanĝo de teknikaj informoj, akcelas la elformiĝon de unuecaj normoj. Ĝis nun ĉ. 50 produktaĵojn ĝi specialigis tiamaniere, ke unu specon de varo produktas nur unu lando ankaŭ por ĉiuj membro-landoj. La direktadon faras delegitoj el ĉiuj membroŝtatoj, sed la Plenuma Komitato kiel centro — Oficejo Intermetall — funkcias en Budapeŝto.

Komp. kaj tr.: Szilárd BÁLINT

LASZLÓ BENJÁMIN

MI VOLIS FAJRON...

Mi volis fajron trinki spite,
tepidan akvon trinki devis,
de malamik' ne mortpafite,
potencon juste ne ricevis.

Ducent dek jarojn ludi kun mi
Mort', mia kolerulo, emis,
kaj pasis. Ne komprenas nun mi,
ke min sub teron ĝi ne premis.

Ke mi forfuĝis de ĝi? — tamen,
nur unu mov', unu momento
sufiĉus — mi sterniĝus same
sub la senpova firmamento.

Diriĝas, ke mi danku al ili
bonfaron: ja mi spiras, vivas!
Kial al kiu dankon diri,
se mia vivo nur signifas,

ke sub ŝarĝ' dumilita jen mi
kun tridek jaroj maljun-porta,
milmil mortintoj kuŝas en mi
kaj mi mem estas ĉiu morta.

(1945)

Tr.: K. KALOCSAY

GYULA SIPOS

ONI MIN REKONOS

Kiom koncernas min, ke murdas
aliaj gentoj siajn filojn?
Ja ĉiu murdo 'stas en nomo de l'popolo:
la generaloj ne mensogas.
La Deĵoranta Informanto
de l'Plejsupera Ekzekut-Ofico
pruvas per fotoj: jen, en nomo de l'popolo.
Knabinoj dancas ĉirkaŭ la ŝtiparo
librobruliga. Sur la tablo
fotokopioj de konfesoj,
kaj ĉiuj — sen makulo sanga.
Kiom koncernas min, pri kio mi ne scias?
Sekretaj bank-transpagoj kaj negocoj
de grandpotencoj post kulisoj,
spionoj, homrabistoj, kurieroj
plej konfidencaj, kaj palpebrumetoj,
reklamo de dentpasto sur ekrano,
ni ridetadu, tion ĝuas dupoj.
Kiom murdistoj min koncernas?
L'okulojn mi mallevas. Timas.
Kial torturas min ĉi tristoj?
Mi faras miajn taskojn. Krimas.
Rekonos min miaj buĉistoj.

Tr.: Márton FEJES

Attila Tasnádi

BILDOJ POR L

(La ĉefa tagĵurnalo de
— Voĉo de l'popolo — r
en la nro 10. Nov. 1974.
reshava por nia en- kaj e
redaktoro — ekster nia r
nalo atestas en ĝi pri hom
tisto esperantista. — La T

La familia domo situanta inter montetoj de rando de Budapest ŝajnas kvazaŭ muzeo: super libro-bretoj kaj ŝrankoj ariĝas folklor-ceramikoj kaj lignoskulptaĵoj, abundas metiiloj el pasintaj tempoj en la fenestro-kornicoj inter malnovaj medaloj. Ĉie, ĉie en la tuta loĝejo bildoj, pentraĵoj kovras la murojn, multaj desegnoj, apenaŭ lasante libera ioman surfacon, eĉ ne la vitro-terason. Mia gastiganto, *Mihály GERGELY*, verkisto honorita per premio „Attila JÓZSEF", diskrete turnas mian scivolan rigardon al rimarkindaj aĵoj; liaj akompanaj vortoj klare elmontras la bildaman kolektanton. Mi ne hezitas rimarki tion, kaj li konsente ekridetas:

— Vere, bildoj kaj artaĵoj nur laŭ tia pasio estas kolektindaj. Por mi persone tiuj bildoj valoras same kiel miaj libroj, ili tute same altiras min, kiam ĝuojn kaj pensojn mi deziregas. Artaĵoj, kiuj pleje penetris mian koron, tial situas en mia proksimeco ĉi tie, kaj dum ne-trankvilaj minutoj mi turnas min al ili same, kiel alifoje al poemoj, noveloj. Vidu jen fortikan skizon de *Somogyi* pri Dózsa, la popolheroo, kiu sugestas por mi similan animforton, kian ribelaj poemoj de *Ady;* ĉi karaktera ministo-figuro, desegno de *Feledy*, min memorigas je kamparanoj laborsoifaj de *Móricz*-romanoj. Longe mi povus daŭrigi analogajn pecojn. Tamen nuntempe mi rigardis ilin pli enprofundiĝante ol iam, ĉar al multaj mi adiaŭos: duoncenton da desegnoj mi donacos al mia naskovilaĝo, *Varbó* por fondi tie galerion de bildoj.

Mi aŭdis jam pri tiu plano, nobla gesto. Ĝuste por ekscii ties motivojn mi alvenis. Ke kolektanto oferu siajn plej karajn artaĵojn propravole, sen ia materia rekompenco... Devas ja esti sub tia gesto ankoraŭ io, ia plia motivo?!

— Motivoj?... Tre profunde mi devus komenci por iom klarigi. Ĉe la foraj infanjaroj, ĉe miaj gepatroj, ministo-familio, kie da libroj troviĝis eble tri... Legi mi lernis jam frue, sed ke la mondo estas ankaŭ desegnebla, tion longe mi eĉ ne konjektis. Tial impresis min fulme reproduktaĵoj en ministo-klubo, kien mia patro foje alkondukis min. Pere de ili mi eksentis, ke la mondo estas multe pli abunda, ol ŝajnigas niaj okuloj. Mi bone memoras per kia entuziasmo volis mi mem ion krei, eĉ propran skulptaĵon en nian ĝardenon. Tiaj ambicioj poste malfortiĝis, sed por ĉiam enradikiĝis en mi la amo al la belo, inspiranta min kolekti artaĵojn.



La favorata desegno de kolektanto M. Gergely: Centaŭro kaj ĉevalo de Károly Reich

NASKOLOKO

sindikatoj, NÉPSZAVA
ortis pri nia ĉefredaktoro
kredas la artikolon inte-
erlanda legantaro: la arta
ado — de la nomita ĵur-
trajtoj de verkisto-redak-
lukinto.)

Ankoraŭ en 1945 ĝi komenciĝis, kiam mi estis redaktoro en Diósgyőr, grava industria antaŭurbo de Miskolc — post aperigo de desegno la artisto-amiko donacis ĝin al mi; laŭvice venis ceteraj, per aĉeto, interŝanĝo, reciprokaj donacoj. La kolekto amasiĝis kaj dume mi pli kaj pli intimiĝis kun la verkoj, iliaj artaj sensacioj impetis min; kaj ĝuste tion, la emociojn, plezurojn kaj ĝuojn mi volas dividi kun miaj iamaj samsortanoj, la loĝantoj en mia naskotero. Fondi galerion por ili, tio estas konatigi la plezurojn de la belartoj al vilaĝanoj, troviĝantaj eĉ nuntempe ofte iom ekster la artsferoj.

Mi legas leterkopion, informantan pri la donaco la departementajn aŭtoritatojn. En la aldonita listo mi legas kun miro vicon da eminentuloj de la moderna hungara arto: Mednyánszky, Rudnay, Medgyessy, Szőnyi, Vaszary, Vedres... Tiaj valoraĵoj vere bezonas konvenan lokon kaj gardadon, kompetentan prizorgadon. Eĉ pli: la galerio bezonas konstantan ampleksigon; Gergely ne kaŝas sian intencon: fundamenti per la donaco *muzeon* por la regiono.

— La kvindeko de miaj desegnaĵoj konsistigus nur kernon, ĉirkaŭ kiu poste devos kreski vere granda kolekto, eventuale folkloraĵoj aldoniĝos, restaĵoj el la iama minista vivo kaj ĉio, kio rilatas la popolon de la regiono. Eble helpos tion amika rondo per loka kolektado kaj aĉetado. La galerio-fondo devas — laŭ mia intenco — esti nur komenco por plua loka movado savi gardindajn valoraĵojn.

Kaj kiel reagis la departemento *Borsod* je via, donac-propono?

— Kompreneble oni vere ĝojis, precipe miaj samvilaĝanoj. Funkciuloj de la departemento rapide kaptis la taŭgecon de mia plano por la popol-klerigo; ili eĉ proponis kiel rezidejon por la galerio la plej grandan vilaĝon en la proksimeco, tiel ĝi servu al pli amasa publiko, eventuale kvazaŭ kultura centro. Ankaŭ la loĝantaro entuziasmiĝis, ekzemple kiam mi prove ekspoziciis somere la plej belajn pecojn en la lernejo. La brilo de la okuloj, la vid-avido al la bildoj profunde tuŝis mian koron, pli ol ia ajn oficiala honoro; mia interna intenco komencas sian realiĝon, mi povos rekompenci iom la infanaĝan ŝuldon; la tiamaj emocioj kaj bildoj de mia naskotero gravuriĝis en mian animon, kaj nun mi kapablas rekompenci per desegnaĵoj, mi forte esperas, ke ankaŭ ili ekmovos ion en la animoj...

Trad.: E. FENYVESI

Esperantaj libroj el Hungarlando

Kiam la glacio de la malvarma milito komencis degeli, kun la printempiĝo en 1959 aperis ankaŭ la unua frua frukto de la esperanta libroeldonado en Hungario: lernolibron de Julio Baghy eldonis ŝtata eldonejo. (Intertempe le reeldonoj de tiu lernolibro jam ne multe postrestas 100 000 ekzemplerojn.) Tiu evento ebligis naskiĝon de nova generacio de esperantistoj, kio siavice baldaŭ lanĉis la neceson de eldono de esperantlingvaj libroj. La komenco ne estis facila: devis pasi ses jaroj, ĝis la eldonejo *Corvina* decidiĝis eldoni la verkon de Madách: *La Tragedio de l' Homo*[1] en la majstra traduko de *Kalocsay*. (La unua esperanta eldono de la verko aperis en 1924.) La verko — enhave kaj stile — rikoltis grandan sukceson inter la kleraj legantoj. En nia numero 4/1974 W. Auld nomis ĝin ĉefverko.

La 51-a Universala Kongreso en 1966 en Budapeŝto efikis stimule al la eldonagado. Krom pluraj — inter ili kelkaj luksaj — turismaj libroj povis aperi en la eldono de HEA la unua originalaĵo: *Ora Duopo*[2], omaĝe al la jubileo de *Baghy* kaj *Kalocsay*. Kompreneble, la libro estis favore akceptita de la kolektiĝintaj kongresanoj, tamen, iom mirigis nin la fakto, ke dum la UK vendiĝis el ĝi nur iom pli ol 500 ekzempleroj. (Konsideru, ke ĉeestis 4000 kongresanoj, kaj la prezo de la libro estis malpli ol unu usona dolaro.)

En la sama jaro aperis la tre interesa roman-kroniko de la moderna hungara verkisto *Ferenc Sánta: Dudek horoj*[3]. Siatempe ĝi vekis grandan diskuton en la hungara gazetaro, kaj ankaŭ la esperantista publiko sciis aprezi ĝin. Ĉiukaze, interesiĝantoj pri la politika historio de la hungara vilaĝo inter 1945—1960 malfacile trovos pli fidindan fonton. Grandan sukceson rikoltis la samjare aperinta bestromano de *I. Fekete: Vuk* kaj la ĉarma infanlibro de *Éva Janikovszky: Ĉu ankaŭ Vi scias?* (Intertempe ambaŭ libroj elĉerpiĝis.)

Post la UK la aktivado iomete malpliiĝis, kaj aperis nur modestaj libretoj, kiel *Fabeloj* de *János Dorosmai* kaj *Patromurdo en la Nigra Muelejo* de *István Ráth-Végh*. La sekva vera atuto estis la fabelo de *Béla Balázs: Sep reĝidoj*.[4] La glata traduko de *Éva Farkas-Tatár*, la belegaj plurkoloraj ilustraĵoj de *Ádám Würtz* kaj la internacaiisma enhavo faras ĝin unu el la plej havindaj libroj de nia merkato.

En 1970 plenumiĝis delonga deziro de multaj ŝatantoj de la hungara literaturo: aperis la elektitaj poemoj de *Sándor Petőfi* sub la titolo *Libero kaj amo*[5]. La tipe hungara kaj samtempe internaciisma pensaro de Petőfi ĉiam estis tre korparenca al la esperantistoj, kaj tio ŝuldiĝas ne malmulte al la vere genia interpretado de *Kalocsay*.

En 1973 aperis nova kontribuaĵo el la hungara literaturo: la 408-paĝa romano de *Géza Gárdonyi — Sklavoj de Dio*[6]. Tiu ĉi romano — bone tradukita de *János Hamvai* kaj reviziita de *K. Kalocsay* — kondukas la legantojn al la fora mezepoko kaj per intereskapta historio revivigas la etoson de la monaĥejoj. Ne malmultaj ĝis nun jam dankas agrablajn horojn al tiu ĉi libro.

Aparte elstaras inter la hungarlandaj esperantlingvaj eldonaĵoj la diversgradaj lerniloj. La rektametoda lernolibro de *István Szerdahelyi: Esperanto Internacia*[7] elektiĝis kiel komuna libro de la 5-landa Pedagogio Didaktika Eksperimento, sed verŝajne ĝi estas uzata en pluraj dekoj da landoj. Malpli konata, sed same valora estas la dua volumo de tiu ĉi libro *Esperanto 2*[8], kiu ne nur altigas la lingvoscion de la lernantoj, sed instruas al ili bazajn konojn pri la esperanta kulturo kaj movado. La progresantaj kursoj ricevas taŭgan legmaterialon en la surprize malmultekosta legolibro *Ŝercoj, rakontoj*[9], en kiu aperas verkoj de Baghy, Szilágyi, J. H. Rosbach, Ueyama masao, T. Pumpr ktp.

Por studentoj de superaj kursoj bone servas la *Gramatika demandaro resuma*[10] de *J. Baghy*, kaj la momente elĉerpita *Gvidlibro por supera ekzameno*, en kiu lasta oni trovas la ĝis nun plej bonan esperantan literaturhistorion. En la Filologia Fakultato de la Budapeŝta Universitato „Eötvös Loránd" estas preparata Krestomatio de la Esperanta Literaturo.

De *Kalocsay* aperis detala *sistema gramatiko de E-o* en du eldonoj (1966 kaj 1968) hungarlingve[11].

Kaj la eldona aktiveco en Hungario ne ĉesas. Estas planata eldono de *Antologio de la nuntempa hungara prozo*, kaj HEA tre baldaŭ eldonos du malnovajn verkojn el la satira ĝenro: la primovadajn humuraĵojn de *Julio Baghy: Verdaj Donkiĥotoj* kaj la ĉefverkon de *I. Lejzerowicz: El la „Verda Biblio"*. Ni esperas, ke la internacia legantaro ekatentos pri nia eldona agado, kaj esprimos sian plaĉon per inda aĉeto. Interesiĝantoj en socialismaj landoj turnu sin al sia landa Esperanto-Asocio aŭ al la ŝtata libroimporta firmo, legantoj en landoj kun konvertebla valuto povas sendi mendojn al UEA aŭ rekte al HEA. Kompreneble, amika interŝanĝo kun hungaraj korespondantoj same eblas.

V. BENCZIK

Piednotoj

[1] *La Tragedio de l' Homo* de *Imre Madách* (1823—1864). 259 p., 21 cm., plaste bindita. Majstra drama poemo pri la lukto de la Homo. Traduko de *K. Kalocsay*. Prezo 7,20 ned. gld. (32,— Ft).

[2] *Ora duopo* de *Julio Baghy* kaj *Kálmán Kalocsay*. 183 p., 19 cm., plaste bindita. Kolekto de la ĉefaj verkoj de la du elstaraj aŭtoroj. Prezo: 6,50 ned. gld. (16,50 Ft).

[3] *Dudek horoj* de *Ferenc Sánta* (1927—). 234 p., 17 cm., plaste bindita. Roman-kroniko pri la sociaj ŝanĝoj en la hungara vilaĝo, precipe pri la eventoj de 1956. Traduko de *V. Benczik, I. Botos, L. Somlai, L. Tárkony*. Prezo: 7,— ned. gld. (26,— Ft).

[4] *Sep reĝidoj* de *Béla Balázs* (1884—1949). Plurkoloraj ilustraĵoj de *Ádám Würtz*. 24. p., 34 cm., bindita. Luksa infanlibro. Traduko de *É. Farkas-Tatár*. Prezo: 6,75 ned. gld. (28,— Ft).

[5] *Libero kaj amo* de *Sándor Petőfi* (1823—1849). Elektitaj poemoj. 160 p., 19 cm., plaste bindita. Traduko de *K. Kalocsay*. Kun enkonduko biografia kaj literatura. Prezo: 9,— ned. gld. (42,— Ft).

[6] *Sklavoj de Dio* de *Géza Gárdonyi* (1863—1922). 408 p., 21 cm., broŝurita. Traduko de *J. Hamvai*. Romano el la mezepoko. Prezo: 9,— ned. gld. (60,— Ft).

[7] *Esperanto Internacia* de *István Szerdahelyi*. Rektametoda lernolibro, multkolore ilustrita. 260 p., 24 cm., bindita. Proponita de ILEI kiel unuece uzenda lernolibro. Prezo: 6,— ned. gld. (25.— Ft).

[8] *Esperanto 2* de *István Szerdahelyi*. Progresa lernolibro kun multaj ĉerpaĵoj el la literaturo kaj historio de Esperanto. Riĉe ilustrita. 227 p., 24 cm., bindita. Prezo: 5,50 ned. gld. (21,— Ft).

[9] *Ŝercoj, rakontoj*. Kompilis *V. Benczik*. Legolibro por kursfinintoj, plejparte rakontoj. 104 p., 16 cm., broŝurita. Prezo: 1,98 ned. gld. (4,— Ft).

[10] *Gramatika demandaro resuma* de *Julio Baghy*. 50 demandoj-respondoj el gramatika parto de mezgrada kaj supera ekzamenoj. 44 p., 20 cm., broŝurita. Prezo: 1,60 ned. gld. (6,— Ft).

[11] *Rendszeres eszperantó nyelvtan* de *Kalocsay*, 244 p. Prezo: 22,50 Ft.

Interparolo kun Jose L. Judas, sekretario de Intersindical pri la portugalaj sindikatoj kaj pri la internacia lingvo

La hungara kaj portugala sindikata delegacio — foto György Gonda

En la unua duono de januaro 1975 laŭ invito de la Landa Konsilio de Sindikatoj restadis en Hungario delegitaro de Portugala Sindikata Federacio. Fininte sian viziton, antaŭ sia forveturo, en la Hotelo de L. K. S. akceptis min Jose L. Judas, sekretario de Intersindical, societe kun J. A. Costa, membro de Nord-Portugalia Sindikata Konsilio kaj M. C. Teixeira, membro de Sud-Portugalia Sindikata Konsilio. Al la demandoj metitaj de mi je la nomo de Eszperantó Magazin kaj Hungara Vivo, li komencis nian interparolon jene.

Du milionoj da organizitaj laboristoj

Intersindical unuigas ducent dudek sindikatojn kaj ĉ. du milionojn da organizitaj laboristoj. En nia movado la klopodo por unuiĝo havas oldan tradicion, kompreneble, ja la akraj turmentoj dum la jardekoj post la faŝista potencotranspreno en 1926 ĝustavorte batis en nin ties gravecon. Post la falo de faŝismo en 1974 la sindikata evoluo elaniĝis nature gigante, sed kiel celo de nia laboro, lukto staras senŝanĝe ankaŭ hodiaŭ la batalo por fortigo de la unueco.

— Kion celis via hungaria vizito?

— Antaŭ ĉio ni volis danki al la organizita hungara laboristaro, al la hungaraj sindikatoj pro tiu multflanka helpo, kiun ili estas donintaj al nia movado. Ĉar ni tion vere tre bezonis dum la jaroj de faŝismo. Plie nia tasko estis ankaŭ tio, ke, ĉar la ŝanĝitaj politikaj cirkonstancoj de Portugalio tion permesas, ni striktigu, rektigu niajn rilatojn. Kaj fine mi povas deklari: nia vizito okazis je laŭeble plej bonaj kondiĉoj.

— Antaŭ vi sur la tableto kuŝas ankaŭ nun hispanlingva eldonaĵo de la sindikata movado, ĝuste tiu, en kiu estas konigita la intervjuo de Sándor Gáspár, ĉefsekretario de Landa Konsilio de Sindikatoj, kiun li donis por Eszperantó Magazin kaj Hungara Vivo. Sándor Gáspár opiniis favore al Esperanto kaj deklaris: li proponos, ke la diversaj sindikataj centroj patronu la uzon de la lingvo Esperanto en la internaciaj kontaktoj de la laboristaro.

— Vere, mi jam tralegis la menciitan intervjuon, eĉ kun granda interesiĝo, ĉar ja mi mem ne estas esperantisto, sed multe mi aŭdis pri tiu lingvo, kaj mi povas imagi, ke ĝi povos plenumi la rolon de pera lingvo en la internaciaj rilatoj.

Mi aprobas la ideon de Sándor Gáspár

— Se publikiĝus la voko de la Universala Esperanto-Ascoio, kiun proponis Sándor Gáspár en sia menciita intervjuo, tiam, viaopinie, kiel vidpunktus la portugala sindikata movado?

— Al tiu demando la respondo estas parte facila, parte pena. Facila, ĉar kiel mi menciis, mi jam legis la intervjuon, kaj pro tio mi scias, kial Sándor Gáspár taksas grava la lingvon Esperanto. La malfacilaĵo estas en tio, ke ĉe ni, en la direktul-rondo de Intersindical estas netranspaŝebla principo pri kia ajn starpunktado, ke ĝi devas esti kolektiva. Se mi pesadas la aferon tion konsciante, mi devas respondi, ke mi ne rajtas fari deklaron.

— Ekzistas tamen io, kiu faciligas la respondon. Ni pensas pri tiu nia principa starpunkto, laŭ kiu ni subtenas per nia pleja kapablo, per nia tuta forto ĉion, kio patronas la interproksimiĝon de la monda laboristaro. Firma nia intenco estas, ke el tio ni cedos neniam. Kaj ĉar mi pensas tia afero la disvastiĝon de Esperanto, miaparte la voko estos subtenata ĉe la hejmaj intertraktoj, kie ni konceptos la oficialan starpunkton de nia sindikata movado.

La gastlaboristoj kaj Esperanto

— Hodiaŭ ĉiam pli multaj vojaĝas, kaj en tiu vojaĝa inundo kreskas la nombro de laboristoj. Esperanto, ĝuste ĉar ĝi estas la plej facile ellernebla lingvo, povus utili en tio, ke realigeblu striktaj kontaktoj inter diversaj gepatrolingvanoj. Kaj ĉar ĝuste la laboristoj havas la minimuman eblon por tute posedi la grandajn mondlingvojn, Esperanto povus servi speciale iliajn interesojn, des pli, ke multaj laboristoj dise en Eŭropo gajnas sian kaj familian salajron for de sia hejmlando, kiel gastlaboristoj.

— Mi volas emfazi, ke ĝi estas mia persona opinio, sed ĉar Intersindical apogas ĉion, kiu proksimigas la laboristojn, supozeble ni ankaŭ oficiale apogus la menciitan vokon.

— Kiajn internaciajn klopodojn, celojn havas la portugala sindikata movado?

— Ankaŭ ni observas, ke la eŭropaj sindikataj movadoj proksimiĝas en la lastaj jaroj unu al la alia, kaj ni konkordas je tio.

Kio nin koncernas, ni intencas formi bonajn kontaktojn kun ĉiu organizaĵo, kaj pro tio ni ne aliĝas iun internacian centron. Ĉi tiun nian decidon demonstras ankaŭ niaj propraj cirkonstancoj hejme, nome ni ne volas endanĝerigi la unuecon de nia hejma sindikata movado. Sed tion mi devas noti, ke ni volonte partoprenus la internaciajn konferencojn kaj ĉe ili ni ĉiam emfazus la neceson de unueco.

(Aperis en Eszperantó Magazin 1975/3.)

Attila ORBÁN — Tr.: Gábor TIMÁR

„ESZPERANTÓ MAGAZIN" – nia surstrata propagandilo

Ĝuste antaŭ jaro ni raportis pri la apero de „Eszperantó Magazin", *hungarlingva oficiala organo de Hungara Esperanto-Asocio. Ni pensas interesa doni por la legantoj de HV mallongan rerigardon pri la numeroj de nia Magazino aperintaj en la pasinta jaro.*

La entrepreno estis ne tro facila, ja ni devis suriri terenon ĝis nun ne prilaboritan. La ĉiumonata aperigo de nacilingva revuo pri Internacia Lingvo Esperanto kaj ĝenerale pri la problemo de la multlingveco ne nur en Hungario, sed ankaŭ tutmonde estas sentradicia. Rezulte, malgraŭ la plej kvalitaj artikoloj kaj bela aspekto de la Magazino, la unua jaro de la apero ne donis tiel grandan prosperon, kiom ni esperis. Tiu tempo estis sufiĉa por prilabori la karakteron de la revuo kaj ni povas konstati la iom-post-ioman grandiĝon de interesiĝo kaj rekono pri nia Movado flanke de ĉiuj tavoloj de la socio: de politikistoj, lingvistoj, verkistoj, aktoroj kaj laboristoj.

Kelkajn artikolojn de la Magazino povis legi ankaŭ niaj legantoj, sed krom tiuj nur por ilustri la karakteron de nia hungarlingva revuo, ni mencias kelkajn titolojn, kiuj aperis en la pasinta jaro.

En la unuaj tri numeroj ni publikigis lingvokurson por komencantoj kaj por la progresantoj en ĉiuj numeroj de la Magazino aperas rubriko sub la titolo „Ni lingvistu kune", lerte redaktita de s-rino Ada CSISZÁR. La aperigo de dulingvaj tekstoj servas pruvi la tradukeblecojn de Esperanto kune kun la tradukitaj verkoj de niaj aŭtoroj: AULD, DE KOCK, KEN MINER, RIBILLARD, SEKELJ, VATRÉ kaj WARINGHIEN. Tiun temon kompletigis la bone verkita studo de Vilmos BENCZIK sub la titolo: „La plej nova Esperanto-literaturo".

Grava fakto estas por nia Movado, ke favore opiniis pri Esperanto politikistoj kaj sindikatestroj, lingvistoj kaj sciencistoj, aktoroj kaj verkistoj. Por ni estas sukceso la pozitiva reflekto de laboristoj kaj kamparanoj.

La Magazino kiel oficiala organo de la landa Movado plenumas ĉi taskon per la rubriko „Lingvo kaj Movado" kaj per la rubriko „Junularo" kiujn redaktas Ludoviko KÖKÉNY kaj János INGUSZ.

Ŝatata rubriko de la Magazino estas „Revuo de la hungara gazetaro", kiu publikigas reflektojn al artikoloj tuŝantaj la lingvan problemon. La rubrikon redaktas eminenta ĵurnalisto Imre SZENES. Same estas legata la kompilo de interesaj artikoloj sub la titolo „El cent Esperanto-gazetoj", tradukita de Mihály GERGELY, ĉefredaktoro de la Magazino.

La Magazino aperas sur bona papero per bela tipografio kiel Hungara Vivo. La paĝojn faras buntaj la fotoj kaj grafikaĵoj. Humura rubriko, trafaj karikaturoj, krucenigmo kaj reklamoj donas al la Magazino vere plaĉan aspekton, kiu eltenas ĉiujn komparojn al aliaj nacilingvaj revuoj.

Ni povas rekomendi ĉi gazeton ankaŭ ekster la ŝtatlimon, ĉefe al hungaroj. Laŭ letera peto la redaktejo sendas senkostajn specimenekzemplerojn.

Finante la trarigardon de la unua jarkolekto de „Eszperantó Magazin", ni deziras por ĝia redaktoraro forton, sanon kaj ankoraŭ multe da rezultoj!

L. RIETH

Fondigo de „Budapeŝta Esperanto-Arkivo"

La prezidantaro de Hungara Esperanto-Asocio okaze de sia kunsido la 13-an de Decembro 1974. akceptis la proponon de Mihály GERGELY pri la fondo de *Budapeŝta Esperanto-Arkivo.*

La organizo de la Arkivo fariĝis jam neprokrasteble bezonata, ĉar por la redaktado de Hungara Vivo, Eszperantó Magazin kaj aliaj E-revuoj bona ĉe-mana biblioteko kaj ankaŭ revuo- kaj fotoarkivo estas nemalhaveblaj. La kolekton povos bone utiligi krom la redaktoroj ankaŭ la E-fakaj profesoroj kaj studentoj de la provincaj Altlernejoj kaj ankaŭ la fak-komisionoj de Hungara Esperanto-Asocio.

La pluan gravecon de la kolektaĵo la propono jene motivis: „Ni rigardu la Budapeŝtan Esperanto-Arkivon kiel valoran kolektaĵon de kulturhistorio. Ni kredas, ke iam venos la tempo, kiam la problemon de la multlingveco oni solvos per la akcepto de iu internacia lingvo. Ĉu ĝi estos Esperanto, ĉu iu alia lingvo, tamen la kultur-historia valoro de tiaspeca landa kolektaĵo multoble grandiĝos. Pensante pri tio ni devas fari nian laboron".

Ekde la akcepto de la propono la Arkivo komencis sian funkciadon. Por la gvido de la Arkivo la prezidantaro de Hungara Esperanto-Asocio petis sinjorinon Ada CSISZÁR, gvidanton de la Arkivo de la Partia ĵurnalo „NÉPSZABADSÁG", kaj sinjoron dr. Árpád MÁTHÉ universitatan adjunkton (kiu havas en nia lando eble la plej grandan privatan kolektaĵon de E-libroj kaj revuoj).

La Arkivo kolektas krom la plej gravaj E-libroj, vortaroj, leksikonoj kaj lernolibroj ankaŭ la konsiderindajn E-revuojn. La Foto-Arkiva fako krom la konservo de la fotoj kolektiĝintaj dum la redaktado de la revuoj, klopodas kolekti ankaŭ la hodiaŭ ankoraŭ troveblajn kaj konservablajn malnovajn fotojn. La Arkivo kolektas ankaŭ la interesajn kaj belajn dokumentojn de la landa kaj internacia E-Movado (leteroj, invitiloj, eldonaĵoj, insignoj ktp.), la poŝtmarkojn de la tuta mondo, kiuj rilatas al Esperanto, la leterojn kaj manuskriptojn de famaj E- aŭtoroj, artikolojn pri la Internacia Lingvo kaj pri E-Movado ktp.

La Arkivo kun dankemo akceptas ĉiujn donacojn de la landa kaj internacia esperantistaro, per kies donacoj la kolekto estas riĉigebla. La nomojn de la donacintoj — kun la priskribo de la donacoj — ni publikigos en speciala rubriko de HV, kie ĉiam temos pri la funkciado de la Arkivo.

Ni pensas, ne estas bezonate longe pruvadi, ke la aparte gardataj personaj objektoj fine perdiĝas, sed en bone zorgita centra kolektaĵo konserviĝas kaj povos riĉigi la valoran publikan Arkivon.

***

La Arkivo ĉi-foje dankas al siaj unuaj donacintoj:

Al s-ro László MOLNÁR (Székesfehérvár, Árpád-fürdő) de kiu ni ricevis la Julian numeron de „La Revuo" aperintan en la jaro 1912., la Januaran kaj Majan numerojn de la japana revuo „Orienta Azio" aperintajn en la jaroj 1913. respektive en 1914. kaj la E-lernolibron verkitan de Jenő LÁNG, eldonitan en la jaro 1905.

Al s-ro Jenő ZÁGONI (Sepsiszentgyörgy, Rumanio), de kiu ni ricevis fotokopiojn de Zamenhofaj leteroj skribitaj al lingvo-scienculo Gábor BÁLINT, kaj fotojn. (Niaj legantoj en la pasintjaraj numeroj de la revuo „Eszperantó Magazin" povis vidi kelkajn donacojn de ambaŭ donacintoj).

***

La adreso: *Hungara Esperanto-Asocio, 1368 Budapest VIII. Kenyérmező u. 6.*

(Aperis en Eszperantó Magazin 75/1.)

Tr.: L. RIETH

EGER



HEVES MEGYEI TANÁCSI ÉPÍTŐIPARI VALLALAT
KONSTRU-INDUSTRIA ENTREPRENO DE KONSILANTARO
DE DEPARTEMENTO HEVES
3301 Eger, Klapka György u. II Pf. 7.

ÜGP

La izolvand-elemento ÜGP estas kavhava gips-perlita plato uzebla interne de konstruaĵoj, fabrikebla en konforma longeco respondanta al la diversaj internaj altecoj.

Ili estas planeblaj kaj enkonstrueblaj per teknologio laŭ la preskriboj teknikaj de ME. 94—66. Pri ĉi tiu fabrikaĵo informas la n-ro 1973/1. de „Tervezési Információ" (Planada Informo).

La plato pretiĝas en formo kaj mezuroj laŭ figuro I. Ĝia bazmaterialo estas gipso kaj perlito, ĝenerale en pezproporcio 95—5%. La proporcio rilata al la bazaj materialoj dependas de ties kvalito.

La pezo de la plato depende de la mezuroj (1,62—1,80 m²):
malseke pr. 95—110 kg,
seke pr. 65—75 kg,
la nombro de la kavoj: 9 pecoj.



Fig. I. 1. ferbeton-plafono; 2. Hilti-*najlo; 3. 25/58/1 U-ŝtalo; 4.* bituran-*strio; 5. ÜGP; 6. tapeto.*

EGER

Procento de kav-volumeno: 28%,
Aer-sonizolado: 27 dB
Varmokonduka faktoro: 0,20 kg-kal/mo C°
Limvaloro de fajrorezisto: 1 horo
Prilabor-ebleco: borebla, skulptebla, segebla
Mezuroj en mm:
Larĝo 607 (+2 —1)
Diko 60 (+2 —1)
Longo 2500—3000 (+3)

La fabrikada kapacito de la entrepreno — okaze de maksimuma produktado — estas 70 mil m²-oj da vandoplatoj. Pro la kresko de produktado la entrepreno moderigis la prezon el 226 Ft/m² (komunkikita en j.1973) je 180 Ft/m², se transprenata el *(ab)* fabrikloko ekde 1975.01.01. ĉe mendoj super 1000 m².

La manieron de konstruado difinas la teknikaj preskriboj. Tiuj preskribas la adapton de ligno-foldoj ĉe aliĝo de la plafono. La rezulto de la dumtempa evoluigo estas la alfiksigo per U-profila ŝtalrelo prezentata en fig. I.

La fiksigo de la ligna konduk-lato al la plafon-strukturo per ŝtudo* povas kaŭzi struktur-konstruajn komplikaĵojn, surpafante per najlopistolo ofte oni krevigas la lignon. Ĉe uzo de ligna konduklato estas pli malfacila la tenado de la platoj en ebeno kaj pretendas pli longan labortempon. — Ĉe uzo de ŝtala kondukrelo dum la daŭro de la alĝustigo nenia apoga helpilo estas bezonata.

La ŝtala kondukrelo estas alpafebla sur la plimulton de la plafonspecoj. Ĉe morterotaj plafonoj estas konsilate loki ĝin antaŭ morterado.

Por certigi la elastan alpuŝiĝon unue oni lokigu *hungarocell* aŭ *bituran-* strion; post tio la alĝustigo de la plankoj estas simple farebla, per ilia enŝovo en la relon de malsupre kaj per kejlado sube.



Fig. II. 1. ferbetona plafono; 2. ÜGP; 3. kojlo; 4. varma tegaĵo (varmizola); 5. malvarma tegaĵo; 6. subaĵa mortero; 7. izola paperstrio.

La kojlaĵo ne estu tro streĉa, ĉar neegale substreĉitaj plankoj rezultigos nenivelitan mursurfacon pro elkliniĝo. Tie, kie aliĝas la elektraj konduktiloj en la kavaĵojn de la ÜGP-vando, oni devas eltranĉi tiuloke la supran konduk-relojn. La adapta teknologio surbaze de la atingitaj rezultoj bone respondis al la atendaĵoj. Laŭ niaj mezuradoj oni bezonas por pretmuntado de 1 m^2-a ÜGP-muro per 0,75 horoj pli malmultan tempon, ol ĉe la 6 cm-ojn dika morterita, glatigita vando. La unuajn muntadojn ni pretigis per bonaj fakspertaj masonistoj, sed pro la simpleco de la tekniko ebliĝis la laborigo de ekzercitaj — por tiu celo — helplaboristoj. La tajlado de lignoplatoj — precipe se malsekaj — kaŭzas multan zorgon ĉe mansegiloj, tial laŭeble oni evitu la pecigon de lignotabuloj, — aŭ oni uzu elektrajn mansegilojn. La internaj aperturfermaj strukturoj, aliĝantaj al la paneloj, estas enmeteblaj per ŝtala kadro (fenestra, porda).

La entrepreno uzas pordojn el BVK—plasto *(portplast).* La mursurfacojn ni elformas per ÜGP-vandopanelo metita super la pordoj. La juntplenigo de la muroj okazas laŭ la teknika preskribo, per mortero gipsperlita.

La likvaĵ-sorba efiko de la muro havanta gipsan bazmaterialon kaŭzis, ke la daŭremeco de la posta gipsa glatigo ne estis ĝusta, tial la entrepreno altigis la adheran kapablon de la obtura materio per plasta dispersa gluilo. En la breĉojn oni devas glui (molino) katunstrion en konforme formitan foldon de la panelo en intereso de la reciproka efikado. La ÜGP-vando pretigita tiel estas tapetebla sen ia ajna plua laborproceso, farbebla per dispersa farbo, aŭ oni povas tegi ĝin per algluita kahelo.

Pluraj dekmiloj da tiaj vand-m^2-oj estas konstruitaj en hungaraj urboj *Szolnok, Eger, Tatabánya, Nyíregyháza,* kaj *Budapest.* En la lastaj jaroj nia entrepreno eksportis jam vando-panelojn ankaŭ al eksterlando.

Fig. III. 1. ÜGP-plato; 2. pleniga mortero; 3. tapeto; 4. breĉtega katun-strio (molino)



** ŝtudo (PIV): mallonga ligna stifto por kunfiksi du pecojn unu al alia.*

Heves megyei Tanácsi Építőipari Vállalat Konstru – Industria entrepreno de konsilantaro de departemento Heves

Sen gradoj starigebla ŝelaĵ – apogilo

La ŝelaĵ-apogilo starigebla sen gradoj, kontinue, estas bone aplikebla ĉe monolitaj ferbetonaj konstruaĵoj, kies planprogramoj kaj aliaj cirkonstancoj ne ebligas la uzon de teknologio de spac-ŝelaĵo. La apogilon planigis Konstru-industria Entrepreno de Konsilantaro de Departemento Heves kune kun la Minej-industria Esplor-instituto.

La apogil-strukturo servas por subteni la plafonbretaron, kaj anstataŭi la ŝarĝtenan lignofoston. La struktura solvo ebligas la kontinuan alĝustigon sen ŝtupa gradigo kaj de precizeco milimetra inter la altecaj limoj uzataj en la praktiko ĝis 2,20—3,00 m-oj. La ebeno de la ŝelaĵo estas starigebla en laŭdezira alteco. La kontinuan starigon certigas simplaj struktur-elementoj ne bezonantaj zorgadon pri konservado, — por ilia funkciigo ne estas bezonata speciala laborilo, krome la manipulado ne postulas ekstran fakkonon.

La plej grava unuo de la apogilstrukturaĵo estas la kontinue starigebla apogilo kun du kojnoj. La kontinuan starigon certigas tio, ke post la utiligo de la levkapacito de unu kojno estas funkciigebla la alia kojno, kaj tiel uzante la du kojnojn alterne, estas realigebla la kontinua movo. La suba parto de la apogilo estas ingo, en kiu moviĝas la supra elemento, la glitfusto. En la poziciajn truojn de la suba ing-parto estas enŝoveblaj la kojnoj, kies oblikva surfaco kontaktiĝas kun la arkforma profilo veldita ĉe la fino de la glitfusto, — respektive kun la rondsekca „lev-rungo"* adaptita

Ebena ŝelaĵo





Apogilstrukturo malpeza





en taŭga distanco proksime al la fino. La arkformaj lev-elementoj, kontaktiĝantaj kun la kojnoj, ebligas, ke en dezirata alteca ebeno la kojnoj estu manipuleblaj de ambaŭ flankoj de la apogilo. La apogilaro estas en ĉiu pozicio sammezure ŝarĝo-porta inter la limoj de la starigeblo.

La apogiloj estas kunligitaj en konforma distanc-divido. Ĉe la suba ingparto de la apogiloj estas realigeblaj kruc-ligoj kaj distanc-certigaj kunligoj per lig-elementoj metitaj en ebenoj paralele ŝovataj kun la funkcia alteco de la kojnoj — en denseco respondantaj al la lokaj pretendoj.

La supra parto de la apogiloj estas formita konforma por teni kaj kroĉi la transpontigajn trabojn.

La teoria longo de la bazelementoj uzitaj por transpontado:

$l_1 = 1{,}20$ m
$l_2 = 2{,}40$ m
$l_3 = 3{,}00$ m

Per la diversaj varioj de la trispecaj trablongoj — konforme al la praktikaj pretendoj — estas realigebla transpontado de streĉdistancoj inter 2,40—6,00 metroj. Per konforma parigo de la baz-elementoj estas ebla la transpontado de streĉdistancoj inter la supraj limoj, ekde la suba limo de 2,40 m-oj per 1 = 0,6 m-a altiĝo.

La transpontado estas distancebla per 80 centimetroj paralele kun la ebeno de la lima muro. Por superpontado estas meteblaj kiel ŝelaĵo lignobreto aŭ ŝelaĵtabulo. La po-kvadratmetra pezo de la apogilstrukturo estas sub 20 kg-oj.

Post la firmiĝo de la betonplafono oni povas rapide kaj facile fari la malsuprenigon de la ŝelaĵo per la duobla kojnostrukturo.

---

* rungo *(PIV): metala lateto kun rektangula sekco servanta (ĉi tie) kiel ŝtupeto por eskalo.*



MODERNECO
MAKSIMUMA KOMFORTO
MODERA PREZO

Meblofabriko KANIZSA

Moderna produktado – moderna produktaĵo!

Loĝoĉambroj Kanizsa–IV, Piccolo, Karina–I, Karina–II, Kékes, Kupido, Kata, Korona, Titusz, –junulara ĉambro Tavasz kaj infanĉambro Kari.

Tapetitaj garnituroj Kedvenc, Rio, Tirol, Piccolo, Titusz, Andrea unupersonaj kaj Kanizsa dupersonaj sofoj, kuŝejoj.

Petu tiujn produktaĵojn – niaj produktoj estas aĉeteblaj en la tuta lando!

Adreso: KANIZSA BÚTORGYÁR (Meblofabriko Kanizsa) 8801 Nagykanizsa, Szemere u. 4. Pf.: 55

La participa demando en la Akademio

Libro de Ebbe Vilborg

Eldono de Lingva Komisiono, Göteborg, 1973. 137 p.

La aŭtoro skribis siatempe, en sia recenzo de mia libro „Vojaĝo inter la tempoj", ke ĝi postulas respondon punkto post punkto. Mi atendis pacience tiujn respondojn, sed nun, post ok jaroj, en ĉi tiu libro mi trovis nur plendojn kontraŭ diversaj manovroj en la Akademio, sekve de kiuj la akademianoj, en la participa demando, decidis malplaĉe al la aŭtoro (per 26 voĉoj kontraŭ 1 ne kaj 4 sindetenoj). Pri mia libro li nur represigis sian iaman recenzon kun la ranca argumento, ke la aspektismo de mia libro estas kontraŭ-Fundamenta, ĉar la Fundamenta gramatiko parolas nur pri tempoj, neniam pri aspektoj de verboj.

Ĉu diskuti? Ve, en gramatikaĵoj konvinki estas preskaŭ maleble. Okazas eĉ, ke homoj praktike akordantaj ne akordas teorie. Ekz-e mia bona amiko, konata E-a verkisto, indulgeme ridetis pri mia „Vojaĝo", dirante ion tian, ke ĝin diktis la homa agresiva instinkto. Eĉ, mi ne scias kial (ĉu ne eble el sia agresiva instinkto?) li ŝajnis pravigi la kontraŭan opinion. Poste, mi montris foje al li, ke en siaj verkoj li ĉiam, senescepte, uzas la pasivon laŭ la recepto de mia „Vojaĝo". Tiam li komencis paroli pri alio kaj ĝis nun estas konvinkita, ke min kondukis miaj agresivaj instinktoj.

Ĉu fini per ĉi tio la recenzon melankolie? Nu, tamen eble la leganton interesos, pri kio temas: kio estas tempismo (atismo) kaj aspektismo (itismo) kaj kial ĉi lasta ne estas kontraŭ-Fundamenta.

La gramatikaj tempoj indikas temprilatojn: tempojn estintan (paseo), estantan (prezenco), estontan (futuro). La verbaj aspektoj, male, indikas, sendepende de la tempo, aliajn ago-nuancojn: daŭran aŭ momentan agon, ago-komencon aŭ agofinon, pretecon aŭ nepretecon de ago. Laŭ la tempistoj, ĉi tiuj aspektoj ne estas esprimeblaj per konjugacio, sed nur per afiksoj aŭ adverboj.

Sed ni rigardu la tempojn. Paseo kaj futuro estas vastegaj tempospacoj, sed la prezenco estas nur sendimensia tempopunkto (nunpunkto), kiu dividas la paseon disde la futuro, senĉese moviĝante antaŭen, lasante post si paseon, konsumante antaŭ si futuron. Kun tiu senhalta nun-punkto la gramatiko ne scias kion komenci. Ĝi estas neindikebla, ĉar kiam oni ĝin eldirus, ĝi jam pasis. Trovanto de monero estas trovinto de monero, ĉar en la trov-momento li povas diri nur: „mi trovis"!

La vera prezenco do ne ekzistas en la gramatiko.

La gramatiko kreis por si falsan *prezencon: ĝi etendas la prezencon je la tempolongo de la agoj okazantaj ĉirkaŭ la nun-punkto. Dirante: „mi vivas", „mi promenas", „mi brosas mian ĉapelon" oni etendas la prezencon por la* daŭro *de sia vivo, promeno, brosado de ĉapelo. En la supraj frazoj la prezencoj signas, ke la vivo, promeno, brosado estas jam komencitaj, sed ankoraŭ ne estas finitaj. Tia prezenco povas esti eĉ de eterna daŭro, ekz-e en la frazo: „la tempo pasas", kaj de tre mallonga daŭro, ekz-e en „li falas" (li perdis la ekvilibron kaj tuj kuŝos surtere). Sole ĝis momenteco ĝi ne povas ŝrumpi, kiel ni vidis ĉe „mi trovis moneron".*

Inter la prezenco kaj la du aliaj tempoj ni povas konstati jenajn diferencojn:

1. La paseo kaj futuro estas memstaraj, sendependaj tempoj, interne de kiuj lokiĝas la agoj. La prezenco, male, ne estas memstara, dependas de la esprimataj de ĝi agoj, kaj lokiĝas interne de tiuj agoj.

2. La paseo kaj futuro estas homogenaj: nura paseo, respektive nura futuro. La prezenco, male, estas heterogena: peco da paseo plus peco da futuro. La ago, nome, kiun ĝi esprimas, jam komenciĝis antaŭ la nunpunkto (paseo) kaj finiĝos nur post la nun-punkto (futuro). Ĝia signifo do estas: komencita nefinita.

Tio validas ankaŭ pri la participo -ata kaj pri la pasiva tempo kun -ata; last-okaze la nunpunkton signas la tempo de la helpverbo „esti".

Kio estas komencita kaj ankoraŭ nefinita, tio estas daŭra ago. Kaj kio estas nefinita, tio ne povas esti pretfarita.

Konklude: ne ekzistas tempa konjugacio. Ĉar la prezenco (-as kaj -ata) indikas daŭron kaj nefinitecon, ĝi enŝtelas en ĉiun konjugacion la aspektojn daŭran („durativo") kaj pretfinan („perfektivo"). La prezenco estas aspekto „imperfekta".

Tial neniu lingvo havanta prezencan participon en konjugacio estas tempisma. Nek la rusa, nek la litova, nek la hindia. Pri la netempismo de ĉi lasta min informis Probal Daŝgupto, konsultinte ankaŭ profesorinon de la hindia lingvo.

K. KALOCSAY

ALDO DE GIORGI:

LA LASTA ROZO

Decembras,
hante
kaptas min la rememoro:
kiam
la lasta rozo ruĝis
en la ĝardeno frostigita.
En la ĝardeno
kie prujno varmis
pro feliĉo enhejma,
kun ŝi.

Decembras,
ruĝas neniu rozo
en neniu ĝardeno.
Ruĝas sangogutoj
el miaj okuloj.
Surtable larmoj
ruĝas kiel sango,
sen ŝi.

LA PROTAGONISTO

La Morto
kun robo sceneja
falĉas
dise, mise, ope,
foje balete
foje apokalipsĉevalgalope.
Drame aŭ kabarete,
kun krako aŭ kun mildo,
ĉu ne, ĉiuokaze,
koreografia
loga bildo?

Lajos Tárkony

REVUO DE REVUOJ

En la ESPERANTO de UEA la prezidanto, *Humphrey R. Tonkin* difinas la prioritatajn taskojn de la movado en tri punktoj. La densan tekston, kies ĉiu frazo estas grava, apenaŭ eblas skize resumi: oni devas ĝin legi, eĉ studi. — La artikolo de *Renato Corsetti* pritraktas la eblojn kaj taskojn, kiujn la E-movado havas en Afriko, kiu, bedaŭrinde, ĝis nun apenaŭ estas reprezentata en la E-a kulturo. — Inter la nekrologoj mi trovis nomon, kiu min batis rekte en la koron: mortis *Frank, R. Banham* en Melburno, Aŭstralio. Mi neniam renkontis lin, neniam eĉ korespondis kun li, tamen mi tenis lin en kalkulo kiel tre bonan konaton, ĉar mi ĉiam prenis en miajn manojn kun ĝojpromesa sento la gazetojn de li redaktatajn (La Suda Kruco kaj poste Aŭstralia Esperantisto). Kaj mi neniam trompiĝis: ĉiuokaze mi povis trovi tie en recenzo, artikoleto, gloso ion saĝan, korvarmige plaĉan, majstre prilumigan. Mi opinias, ke oni devus pluki tiujn saĝajn pensojn el la jarkolektoj de liaj gazetoj kaj eldoni ilin libroforme; ni ne lasu perdiĝi niajn valorojn.

En LA BRITA ESPERANTISTO (802, 1974) gvidartikole la redaktoro rebatas la akuzon, laŭ kiu la propono, ke unu eŭropa gazeto anstataŭu la multajn landajn, devenis el dio scias kia insida intenco. Nu, laŭ mi, *unu* anst. *ĉiuj* estus malsufiĉa, sed oni povus pripensi, ĉu proksimaj landoj ne povus interkonsenti pri komuna gazeto pli impona; ion tian ja celis, almenaŭ en sia titolo, La Norda Prismo kaj La Suda Stelo. Tamen, se iulande ekzistas eblo kaj povo por eldono de gazeto iele reprezenta, neniel estus bone tiun ekstermi; ekz-e nia HV vere ne meritus morton, ĉu ne? — Sian koleran rubrikon *D. J. F. Quirke* nun finas per tio, ke ties temoj malagrablaj donis al li nenian plezuron. Mi opinias tamen, ke li plezuregas per kritikado kiel eble plej drasta, kaj tial li ankaŭ artifikas por si motivon. Jen, ekz-e, li skribas, ke la malkonsilo de *-io* por la landnomoj estis „absurda dekreto" en 1922; kaj nun, kiam la Akademio revokis tiun malkonsilon, li nomas tion „fuŝa ukazo", kiun „ignore sufokos la prudento de la e-istaro, same kiel tiun en 1922". Diopatro! Kion do faros la povraj e-istoj, se ili povos diri nek Italujo („absurde"), nek Italio („laŭ fuŝa ukazo")? Poste en la afero de *ata-ita* li brulstampas la Akademion per potenc-avido pro tio, ke ĝi — je l'sankta bluo! — tenas sin al la Fundamento kaj al la konsekvenca zamenhofa uzado kaj ne al la — Unua Libro. Kial do li ne postulas, ke anst. *tiam, kiam* oni uzu *tian, kian* kiel en la Unua Libro? — Mi ne lasu sen mencio la poemtriopon de *W. Auld:* la japaninspiraj versoj estas suspirleĝeraj kaj tamen penetre sugestiaj.

En DER ESPERANTIST aperanta en DDR (65—66. 1974) ni trovas gvidartikole rajte fieran retrorigardon al la 25-jara jubileo de DDR, kiu, venkinte tiel multajn obstaklojn, fariĝis floranta socialisma ŝtato, vole-nevole rekonita tutmonde, ankaŭ de FRG. Tre interesa estas la raporto pri la Respublika konferenco de la e-istoj; el ties multaj valoraĵoj mi ellevas la referaĵon de la soveta scienculo *prof. dro Armand,* laŭ kiu la Scienca Akademio de Sovetunio ŝarĝis specialan grupon de scienculoj esplori sisteme kaj laŭplane la problemon de la internacia lingvo. Ĝojiga estas la progreso de la e-ista junulara movado; oni ellaboris planon de taskoj plenumotaj por ĝin konservi kaj plifortigi. *D. Blanke* skribas pri *Ludwig Renn,* la fama germana verkisto, kiu, vivanta nun 85-jara en Berlin, estas e-isto, verkis eĉ poemojn en E-o;, la gazeto nun publikigas de li unu E-an poemon kaj artikoleton „Esperanto, lingvo literatura". La gazeto prezentas germanlingve artikolon aperintan en la Literaturnaja Gazeta (Moskvo), verkitan de tri sovetaj scienculoj: *A. Berg, D. Armand,* kaj *E. Bokarev* kaj pledantan por planlingvo kiel por neevitebla kaj sole ebla solvo de la lingvokonfuzo en la sciencoj. Ĝi estas tiel sprite konvinka, ke oni devus ĝin represi etnalingve en ĉiuj landaj gazetoj.

Ni vivas en epidemio de interlingvistika febro, kiel montras ankaŭ FOKUSO, interlingvistika cirkulero, eldonata de *E. Vilborg:* fondiĝis Interlingvistika Centro en La Chaux-de-Fonds (Svisujo). En la Nro 11 de la cirkulero ni trovas multon interesan: Sro *Ric Berger,* la svisa ermito de Interlingva daŭrigas sian batalon kontraŭ E-o per misinformoj, dum lia lingvo ŝanceliĝas vortare kaj principe. Aperis nova eŭropa lingvo: Eŭrolengo: mi ĝin bonvenigas kore, vivu la sekva! Ni sciiĝas, ke la kompatinda *Lienhardt* fariĝis viktimo de *R. Berger,* kiu nomis la supersignitajn literojn „tragedio de E-o" (tamen povus esti feliĉa, se Interlingva havus 1%-on de la E-a presita materialo) kaj volante ree „demeti la ĉapelon", por tiu celo li tralaboris la E-an vortaron. Post 19 provoj la lia estas la 20-a. Ric Berger ekbruligos kandelon de ĝojo kaj eble ĉe ties lumo Lienhardt ekvidos sian eraron.

EĤO estas dana E-a gazeto, malpli anemia ol la averaĝaj. Menciindas la lingva angulo de *P. Neergard* kaj la artikolo pri la „Lupo savenda" kun ilustraĵo montranta la plej simpatian kaj kompatindan el la lupoj.

Al ĉiuj esperantistoj

Kiel oni povis sperti, en la lastaj jaroj ni komencis doni ian indan interesan karakteron por ĉiuj numeroj de nia dumonata revuo. Hungara Vivo. La leteroj, opinioj de niaj enlandaj kaj eksterlandaj legantoj atestas, ke ili akceptis ĉi tiun planon favore, ĉar oni ĉerpadis bone el la numeroj de HV — ekzemple — ĉe klubkunvenoj, prezentadoj, lingvopraktikado, informado por vojaĝo ktp. Ni povas do rekomendi al ĉiuj esperantistoj:

1971/3 — numero pri K. Kalocsay
1972/4 — n.pri Literatura Mondo
1973/1 — n.pri Sándor Petőfi, poeto
1973/2 — n.pri Gyula Illyés, poeto
1973/2 — n.pri Sándor Szathmári, verkisto
1974/1 — n.pri la originala Esperanto-prozo
1974/2 — n.pri Hungario kiel inda turisma celo
1974/3 — n.pri la originala Esperanto-poezio
1974/4 — n.pri la hungara ekonomia vivo
1974/5 — n.pri la originala Esperanto-dramo
1974/6 — n.pri la hungara scienco
1975/2 — n.pri la liberiĝo de Hungario
1975/3 — n.pri la problemoj de la gazetaro de Esperantujo
1975/4 — n.pri Mór Jókai, granda hungara verkisto
1975/5 — n.pri Lajos Tárkony, esperanta poeto kaj eseisto
1975/6 — n.pri la esperanta libroeldono



Saci II. infanĉambro

La dimensioj de la garnituro: 4082 × 1199 × 1199/454 mm.

La ŝrank-kombinaĵo enhavas unu vestŝrankon, du sidiletojn kaj unu komponenton kun pordo, tirkesto kaj skriboplato. La komponentoj, diference de la ordigo, videbla sur la desegnaĵo, estas kunmunteblaj ankaŭ en alia kunmetado.

La vestŝranko estas provizita per du, flanke malfermeblaj pordoj, dividita per vertikala rando, en unu triono bret-hava, en du trionoj kroĉil-hava. La kroĉil-hava parto entenas glithokaron, tireblan perpendikle sur la glataĵon de la ŝrank-kombinaĵo.

La du ŝrank-kuŝiloj servas en fermita stato kiel foteloj, malfermite kiel kuŝlokoj. La dimensio de la kuŝilo estas taŭga ankaŭ por kuŝejo de plenkreskuloj, ekzemple mebligi somerdomon. Post la eltiro de la kuŝiltirkesto la duobla laticela somiero estas malfermebla dudirekten kaj la dorsapogilo estas lokigebla por fariĝi kapapogilo. La kuŝil-tirkesto kaj la ŝranko-parto malantaŭ la dorsapogilo, provizita per malferma pordo, estas uzeblaj por rezervi la litaĵon.

La skriboplata komponento estas enkonstruebla inter la du ŝrankkuŝilojn, aŭ — en alia kunmetado — inter unu el la ŝrank-kuŝiloj kaj la pord- kaj tirkesthavan ŝrankon. La alteco de la skriboplato estas ŝanĝebla laŭ la kresko de la infano ĝis la alteco 594—754 mm-oj. La breton super la skriboplato kun la aldonitaj ŝrankoj oni povas fiksi en la dezirata alteco.



Ŝrank-kombinaĵo „Daisy"

La dimensioj de la ŝrank-kombinaĵo: 3497 × 1804 × 435 mm.

La ŝrank-kombinaĵo konsistas el 4 samprofundaj komponentoj.

La vestoŝranko estas provizita per du „flankmalfermiĝaj" pordoj, en ĝia interna parto troviĝas ĉapeltenilo, eltirebla perpendikle sur la vand- kaj frontglataĵon, kaj du pecoj da glitvesthokaroj. La ŝrankpartoj estas kunkonstruitaj, en la supera kaj malsupera kvaronoj de la unua komponento provizitaj per po 2 malfermaj pordoj, meze malfermebla pordo malsupren (Barŝranko).

La dua komponento havas „flankmalfermiĝan" pordon, (3 × 2) en la meza kaj supera partoj kun bretoj, konvenaj rezervi tolaĵon.

La tria komponento estas pli mallarĝa ol la antaŭaj du, estas 582 mm-ojn larĝa. En la supera parto ĝi estas „malfermporda", meze kun malfermita breto, malsupre kun tri tirkestoj.

La ŝrank-kombinaĵo estas bone lokigebla ankaŭ en etaj loĝejoj, varia, kaj ebligas vastan lokon por ŝarĝado. La speciala dimensio kaj reprezentativa aspekto ebligas ĝin mebli loĝoĉambrojn, oficejojn, klubejojn.

La elegantan kaj bone uzeblan „Daisy" (junularan) ŝrankkombinaĵon la planistoj destinis unuavice en la ĉambron de junaj geedzoj.

La lignosimila artefarita folio faras konvenan transiron al la aliaj mebloj de la ĉambro, kiuj estas supozeble plakaĵkovritaj.

Leterkesto

Nia longjara abonanto *Atanas GAEV*, Asenovgrad, *Bulgario* skribas inter aliaj: „Ŝajnas al mi, ke la enigmoj servas tre bone al la esperantistaro praktikadi la lingvon kaj akiri bonajn konojn pri la historio de nia Movado, por pli bona ekkono de via patrolando kaj aliaj. Mi proponus al vi, se estas eble, por estonte renovigi la presigon de la nomoj de ĉiuj, kiuj sukcese solvis la enigmojn, eble per malgrandaj literoj. Tio servus kiel rekompenco pri ilia daŭra laboro, kaj per tio la revuo sukcesus akiri ankoraŭ multajn novajn abonantojn kaj vekus interesiĝon ĉe multaj malnovaj abonantoj al la enigmoj".

Nia leganto *Jiři PATERA*, Most, *Ĉeĥoslovakio* skribas jene: „Ĝenerale la ideo eldonadi la revuon kun ĉiu numero dediĉita (parte, kompreneble) al iu certa temo estas tre bona kaj laŭdinda, kaj mi esperas, ke en la venontaj jaroj mi trovos numerojn pri la hungara literaturo, muziko, arkitekturo ktp."

Longan kaj tre interesan leteron ni ricevis de s-ro *Ru BOSSONG*, Einhoven, *Nederlando*. Li skribas: „Jam de pluraj jaroj mi legas vian ravan revuon, kaj mi ne povas ne diri, ke mi frandas kaj enhavon kaj lingvaĵon. Tio cetere ne signifas, ke jen mi ne havas kritikon kaj demandojn pri la enhavo de certaj artikoloj kaj pri la uzata lingvaĵo... Kaj nun la plej tikla temo: la tro ofta uzado de ĝenaj neologismoj en viaj revuoj.

Sendube AULD kaj KALOCSAY (cetere de mi tre ŝatataj verkistoj) nun diras: Jen denove tia konservativulo (aŭ eĉ konservativo, kiel AULD skribas sur paĝo 4. de la kajero 1974/3. Eble tio estas simpla preseraro, sed eble ankaŭ elmontro de ekstrema progreso en Esperanto?!).

Mi havas komprenon pri tio, ke oni uzas neologismojn en poezio, sed mi ne komprenas la preskaŭ konsekvencan eviton de la prefikso „mal", kvankam ankaŭ AULD skribas pri la „utilega mal, kiu estas neniam racie kaj konsekvence uzata" (kajero 1974/3 p. 6. 1-a kol.). Prave. Sed tiu nekonsekvenca uzado donas al neniu la rajton ĉie kaj ĉiel uzi senbezonajn neologismojn.

Kiam oni „inventos" novajn vortojn por la iloj nur pro tio, ke ZAMENHOF ankaŭ tie ne konsekvence uzis tiun utilegan sufikson? (ekz. broso anst, brosilo; martelo anst. martelilo). Por multaj precipe komencantaj esperantistoj tio estas nekomprenebla afero sed verŝajne niaj fervoraj progresemuloj havas bonan klarigon pri la afero.

En ĉiuj viaj tre legindaj kajeroj oni povas kolekti (verŝajne vi dirus: pluki) belan bukedon da tiaj laŭ mi senbezonaj neologismoj, kiuj ofte eĉ ne troviĝas en PIV. Por deĉifri ilin oni bezonas manipuli multajn diverslingvajn vortarojn, kaj tio ŝajnas al mi ne estas la celo de Esperanto!

Belan bukedon da tiaj vortoj liveras la cetere bonega artikolo „Sciencfikcia situacio" (1974/3 p. 26.27) de nia fama K.K. Sendube miaj pretendoj kaj kompetenteco ne povas konkurenci kun tiuj de AULD kaj KALOCSAY. Tamen ne sonas simpatie, kiam estiminda homo, kiel AULD, defendas la (tro) uzon de poeziaj neologismoj per tiaj vortoj, fortimiginte jam antaŭe ĉiujn kritikantojn. Tiu, kiu kritikas, ja ne havas literaturajn pretendojn nek kompetentecon, do li prefere silentu!

Mi cetere ne komprenas, kion komunan kun literaturo havas simpla artikoleto pri la klimato en Siberio, kiam oni skribas pri „aŭstera" vetero. (1974/2 p. 20). Laŭ PIV aŭstera signifas „morrigida". Sed verŝajne la tradukisto volis pruvi sian kompetentecon pri literaturo kaj pro tio uzis neĝustan literaturan terminon. En la sama kajero oni tute senbezone uzis tiajn vortojn kiaj paseo, presio, riportisto, prohibo, dum ekzistas bonaj ekvivalentoj certe ne malpli belaj. Krome en la kunteksto ili havas nenion komunan pri literaturo.

Jen kion mi volis skribi al vi pri via bonega revuo."

De *s-ro Walter ZELAZNY*, Rzeszów, *Pollando* ni ricevis la subajn rimarkojn: „La revuo unuigas eksterordinare aferojn de Esperanto kaj Hungarujo. Kredu al mi, ke plaĉas al mi tiu eldonpolitiko. Kelkaj pensas, ke revuo esperanta devas esti neŭtrala laŭ politiko kaj devu okupiĝi pri t.n. „niaj aferoj". Malvero, ĉar la Internacia Lingvo tiamaniere perdus la ĉefan sencon de sia ekzistado, ĉar ĝi devas servi kiel ilo de interkompreno por homoj.

... Vere nenion mi povas aldoni, nur deziri al „Hungara Vivo" sukcesojn kaj batalon por ke la revuo aperu ĉiumonate. Mi kiel favora leganto faros ĉion por trovi al Vi pluajn amikojn kaj abonantojn".

Finante nian leterkeston ni kun ĝojo citas el la letero de *s-ro Agostinho ALMEIDA*, Coimbra, *Portugalio*, kiu skribis: „Mi jus tralegis specimenon de via interesa (riĉenhava) kaj bone skribita revuo — Hungara Vivo. Ĝi tre plaĉis al mi. Nun, ke mia lando (popolo) liberiĝis de la faŝistoj, post granda nokto de 48 jaroj de obskurantismo, ni estas finfine liberaj homoj. Vivu la libereco! Vivu la demokratio! Ĉar ni estas (finfine) liberaj, ni jam povas pripensi kaj paroli libere. Do ni povas legi ĉion, kion oni volas. Ni tute bezonas, ke ĉiuj popoloj helpu nin, ĉar necesas rekonstrui nian landon. Ankaŭ ni bezonas kontakti kaj koni aliajn popolojn (iliajn pensmanieron, vivmanieron, civilizacion, kulturon, ktp.) por ke ni fakte sentu, ke la homoj — ĉiuj homoj — estas fratoj, malgraŭ siaj naturaj malsamecoj kaj eventualaj diversaj pens- kaj agmanieroj. La limbaroj rompiĝis por ni finfine! La portugaloj povas ĉirkaŭbraki siajn fratojn de aliaj landoj. Vivu la amo inter la homoj de la Terglobo!"

***

Okaze de la festotagoj de la kristnasko kaj novjaro ni ricevis multajn leterojn, poŝtkartojn. Ni dankas la tutkorajn gratulojn kaj ankaŭ ni deziras al ili ĉion bonan. — Redakcio de Hungara Vivo.

Korespondi deziras

El Pollando: F-ino Joanna DUBROWSKA, ul. Tarnogórska 67/10, 44—100 GLIWICE, 18-jara lernantino pri moderna pentroarto, muziko kaj pri sporto, pri interesaj libroj; — *S-ro Waldemar JAKUBIEC*, ul. Drukavska 4/30, 53—312 WROCŁAW, 20-jara studento kun la tuta mondo pri literaturo, moderna muziko, sporto, turismo, reciproka gastigado, kino kaj teatro. Interŝanĝus poŝtmarkojn, bildkartojn, mod-revuojn kaj gramafon-diskojn; — *F-ino Renata RUBACHA*, pl. Niepodległosei 4/19, PIOTRKOWTRYB, woj. ŁODZKIE, pri literaturo, moderna muziko, sporto kaj turismo; — *S-ino Jolanta RZAŻEWSKA*, ul. Krakowskie Przedmiercie 52/54 m/9, 00—322 WARSZAWA, pri ĉiu temo kun la tuta mondo.

El Rumanio: — F-ino Sylvia CIGHIR, str. Budai N. A. Nr. 4. ODORHEIU SECUIESC, Jud. HARGHITA, 18-jara oficistino pri muziko, libroj, sporto, filmoj nur kun hungaraj esperantistoj.

El Sovetunio: — F-ino Anne LAM, str. Nüdi 8—2, TALLIN — 3, Estona SSR, 23-jara poŝtistino kun la tuta mondo pri turismo, fotado, diapozitivoj, E-Movado.

Patrujo mia



HORIZONTALAJ VICOJ: 1. *Kolomano KALOCSAY en sia poemo „Patrujo mia" salutas la liberiĝintan Patrujon kaj la Liberiganton, kiu helpoplene venis rekonstrui la landon:*

... Ĝi ne almozon vantan al vi donas,
sed prenas vin je mano kaj admonas:

„Kuraĝon, lernu marŝi kaj paŝegi! ... — *la daŭrigon de la poemo vi trovas en vicoj vertikalaj: 19.; 3.. kaj 48. kiuj estas ensendendaj. Limdato de la alsendo: la 1-a de ..... 1975.* 15. Sufikso. 16. Societo, konstanta kaj oficiala de literatoroj, artistoj aŭ sciencistoj (Radiko). 17. Ordometu! 18. Bleki, kiel bovo (R). 20. Aŭdorgano. 21. Estro de monaĥoj. 22. Fariĝi posedanto de io konkreta (R). 24. Ĉe la helenoj kaj Romanoj la astrologojn oni nomis tiel (R). 25. Sidu sur seĝon de reĝo! 26. Reen: tabelvorto. 27. Amasiĝis densa akva vaporo. 30. Virina nomo. 32. Subite prenos per rapida movo. 34. Helena giganto kiu portis la ĉielon sur siaj ŝultroj (R). 36. Pintarko (R). 37. Fabelan infanmanĝantan giganton. 39. Plata kuko el nefermentita pasto (R). 41. Kora inklino. 42. Malsano pro enesto de libera aero en la sango. 45. Akiri fortan emon al ia ago pro ofta ripetado (R). 47. Konjunkcio. 49. Grekdevena scienca vorto, signifanta: orelo (R). 51. Muskaptantaj dombestoj. 52. Genronomo de grandaj plurjaraj herboj (Veratrum L. el liliacoj). 54. Rivero — hispane (RIO). 56. Reen: prepozicio. 58. Esti movata tien kaj reen de sinsekvaj malfortaj skuetoj. 60. Milita kirasita aŭtomobilo moviĝanta per raŭpoplandoj (R). 62. Muzika termino por intervalo de altoj inter du tonoj malproksimaj (R). 64. Inciti al batalo (R). 65. Paserforma mezgranda birdo (R). 67. Nomo de ĉiu el la tri diinoj kiuj ŝpinas, bobenas kaj tranĉas la fadenon de la homa vivo. 78. Reen: pinglarbo (R). 79. La skeleto de la kapo. 81. Ilo por forŝovi malpuraĵon. 83. Valora metalo (R).

VERTIKALAJ VICOJ: 1. Unu el la grandaj Antiloj, sude de Kubo. 2. Direkti la elvolviĝon de fizikaj, moralaj kaj intelektaj kapabloj (R). 4. Reen: sekvos post la sepa. 5. Gutus saleca likvaĵo el okuloj. 6. La plej alta perfekteco (R). 7. Rilata al iu Eŭropa ŝtato. 8. Inklino. 9. Reen: moviĝi per piedoj (R). 10. La centra parto de rado. 11. Sufiĉe malofta substanco de amfotera karaktero. (R). Kio ĉirkaŭas nin. 13. Japana baza monunuo. 14. SĜ. 21. Ekspoziciejo de pentraĵoj, skulptaĵoj klasikaj. 23. Teorio pri arto de publika elokventa parolo (R). 26. Filozofia termino por nemateriala individua esenco. 28. Tre bonan. 29. Fino de vosto! 31. Tre granda. 33. Turka oficiro (R). 35. Verko, en kiu la aŭtoro kritikas moke la ridindaĵojn aŭ malvirtojn de la samtempuloj (R). 38. Aparato, konsistanta el peza rado tre rapide rotacianta ĉirkaŭ akso kardane muntita. 40. Postsigno restanta de resaniĝinta vundo. 43. Virnomo. 44. ODJ. 45. Granda nekovrita vazo por hejmaj uzoj (R). 46. Maturaĝa, alte respektinda sinjorino. 50. Ceremonia kapvesto de la papo, ornamita per tri kronoj. 53. Unuo de elektra rezistanco. 55. Persona nedifinita pronomo. 57. Parto de la animala korpo enhavanta la cerbon (R). 59. Multaj sanktaj bildoj pentritaj sur lignajn tabulojn. 61. Ordoni militistan movon (R). 63. Laŭ la vivmaniero de nobelo, kiu ricevis de superulo feŭdon kaj ŝuldis al tiu persono servadon. 64. Adverbo (R). 66. Unudimensia kontinua aro de punktoj. 68. Loĝanto de nia planedo (R). 71. Perceptebla per flaro (R). 74. Antikva greka monereto (R). 75. Konjunkcio. 76. Ire de unu loko al alia, ne restante (R). 77. Fino de metropolo! 80. RU. 81. Interjekcio. 82. Sufikso.

La ĝusta solvo de nia enigmo aperinta en HV 74/5 estas:

H. 1. *„Ĉien emanas vivo per disperso*
komenco, fino ĉiam nur alternas,
ne estas morto, sole viv eternas"
V. 1. „Ĉu esti aŭ ne esti"

Libropremion gajnis: Teodoro Löwenkopf 15/60 — Maagan, Israel. Cseh József Szolnok TVM III. Munk. száll. 117. sz. Bárta Františ ek Gorkého sad 2. Žilina ČSSR.

FERI

Internaciaj Esperanto-Aranĝoj en Hungarlando

07—06/12	13a SEU (Somera Esperanto-Universitato)	Gyula
07—13	Internacia Virina Renkonto	Budapest
07—12/21	8a IREN (Internacia Renkontiĝo Naturamika)	Abaliget — Pécs
08—15/27	8a PIT (Pionira Internacia Tendumado)	Zánka — Úttörőváros
08—18/23	4a VIS (Varia Internacia Semajno)	Budapest
12—28/ 76—01—02	5a VEF (Vintra Esperantista Ferio)	Budapest

***

Pri la aranĝoj aperis kajero „HUNGARLANDO INVITAS VIN POR 1975" kun detalaj invitiloj. Interesiĝantoj petu ĝin de

TURISMA KOMISIONO
de HEA
7601 Pécs Pf. 2.

LA PERANTOJ DE HUNGARA VIVO EN EKSTERLANDO

Peranto al eksterlando: KULTURA, H—1389 Budapest P.O.B. 149
Abonprezo por unu jaro (ses numeroj): 6,— Usonaj dolaroj, aŭ egalvalora sumo en alia valuto

AŬSTRIO: GLOBUS (VAZ) Höchstädtplatz 3, 1200 WIEN XX.,

AŬSTRALIO: C.B.D. LIBRARY AND SUBS. SERVICE, Box 4886, G. P.O. SYDNEY, N.S.W. 2000
COSMOS BOOKSHOP, 145 Ackland Street, ST. KILDA 3182 READ AND CO., 694—696 George Street, SYDNEY N.S.W. 2000

BELGIO: AGENCE MESSAGERIE DE LA PRESSE, 1 Rue de la Petit-Ile 1070 BRUXELLES
OFFICE INTERNATIONAL DE LIBRAIRIE S. A., Avenue Marnix 30, 1050 BRUXELLES

BRAZILIO: LIVRARIA D. LANDY LTDA, Caixa Postal 7943, 0100 SAO PAULO

BRITIO: BRITA ESPERANTISTA ASOCIO, 140 Holland Park Ave., LONDON W11 4UF
COLLET'S HOLDINGS LTD., Denington Estate, WELLINGBOROUGH, Northants NN8 2QT
THE DANUBIA BOOK COMPANY, 58. Chatswort Road, LONDON NW2 4DD

BULGARIO: DIREKZIA REP, SOFIA

ĈEĤOSLOVAKIO: MAĐARSKA KULTURA, Narodni Třida 22, 115 66 PRAHA I.
POSTOVA NOVINOVA SLUZBA — dovoz tisku, Vinohradská 46 PRAHA
POSTOVA NOVINOVA SLUZBA — dovoz tlace, Leningrádská 14, BRATISLAVA

ĈINIO: CNPICOR, P.O.B. Nr. 88, PEKING

DANLANDO: MUNKSGAARD'S BOGHANDEL, Norregade 6, 1165 KOBENHAVN K.

FINNLANDO: AKATEEMINEN KIRJAKAUPPA, Keskuskatu 2, 00100 HELSINKI 10.

FRANCIO: AGENCE LITTERAIRE ET ARTISTIQUE PARISIENNE, 23 Rue Royale, PARIS 8.
SOCIÉTÉ BALATON, 12 Rue de la Grange Bateliere, 75 PARIS IXe

G.D.R.: ZEITUNGSVERTRIEBSAMT, Strasse der Pariser Kommune 3—4, 1004 BERLIN

G.F.R.: VERLAG Hans LEIPNITZ, Hölderlinstrasse 10, 6 FRANKFURT 1.
W. E. SAARBACH GMBH, P.O.B. 101610, 5 KÖLN 1.

HINDIO: NATIONAL BOOK AGENCY PRIVATE LTD., 12 Bankim Chatterjee Street, CALCUTTA

ISRAELO: LEPAC LTD., 15 RAMBAM Str., TELAVIV

ITALIO: LIBRERIA COMMISSIONARIA SANSONI, Via Lamarmora 45, Casella Postale 552, 50121 FIRENZE
SO. CO. LIB. RI., Piazza Margana 33, 00186 ROMA

JAPANIO: MARUZEN CO. LTD., P. O. Box 5050 TOKYO INTERNATIONAL, 100—31. NAUKA LTD., 2—30—19 Minami-Ikebokoro, Toshima-ku, TOKYO 171.

JUGOSLAVIO: JUGOSLOVENSKA KNJIGA, Terazije 27, BEOGRAD
PROSVETA EXPORT—IMPORT, P.O.B. 555, Terazije 16/1, 11001 BEOGRAD

KANADO: PANNONIA BOOKS P.O. Box 1017, Postal Station „B" TORONTO Ont. M5T 2T8

DÉLIBÁB FILM AND RECORDS STUDIO, 19 Prince Arthur Street west, MONTREAL 130 P.Q.

KOREO: „CHUIL U", PHENJAN

KUBO: INSTITUTO CUBANO DEL LIBRO, Obispo 461, HABANA

NEDERLANDO: UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, ROTTERDAM 3002

NORVEGIO: A/S NARVESENS LITTERATURTJENESTE, Box, 6140, OSLO 6.

POLLANDO: B.K.W.Z. RUCH, ul. WRONIA 23, 00—840 WARSZAWA

RUMANIO: D.E.P. BUCURESTI
D.E.P. ARAD

SOVETUNIO: POCHTAMT—IMPORT, MOSKVA
POCHTAMT—IMPORT, LENINGRAD

SVEDIO: NORDISKA BOKHANDELN, Alströmergatan 22, 101—10 STOCKHOLM

SVISLANDO: AZED AG. Dornacherstrasse 60—62, BASEL 4002
METROPOLITAN VERLAG, Teichweg 16, 4142 MÜNCHENSTEIN

USONO: FAM BOOK SERVICE, 69 Fifth Avenue NEW YORK, N. Y. 10003
HUNGARIAN BOOKS AND RECORDS, 11802 Buckeye Road, CLEVELAND, Ohio 44120

VENEZUELO: LUIS TARCSAY, CARACAS, Apartado 50892

VJETNAMO: XUNHASABA, Phong Phat Hanh Bao Chi, 17 Dinh Le HANOI, RD

Hungaroj ekabonu por eksterlandanoj!

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
1368. Budapest, Hungario,
Kenyérmező u. 6.
Aperas dumonate
XV. jaro. 1975. 2-a numero

Ĉefredaktoro: *Mihály Gergely*
Responda redaktoro:
d-ro Jozefo Mátéffy
Lingva revizio: K. Kalocsay
Arta redaktoro: *Jozefo Szekeres*

Redaktoraro:
Szilárd Bálint, Vilmos Benczik, Ada Csíszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, Zsolt Gyarmathy, d-ro Lajos Lesznai, Alfonso Pechan, László Rieth, Aurél Ponori Thewrewk, Mária Rózsa Szabó, d-ro István Szerdahelyi, Tibor Újlaki-Nagy

Ĉefkunlaborantoj:
D-ro Géza Bárczi, Paŭlo Balkányi, Károly Jobbágy, Mór Korach, Ludoviko Kökény, Lajos Tárkony

Redakcio: Budapest, VIII.
Kenyérmező utca 6.
Telefono: 141-078
Eldonas: „Népszava" Gazeteldona Entrepeno, Budapest, VII., Rákóczi út 54.

Responda eldonisto: Márton Gábor direktoro

Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poĉtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215—96162 Budapest. V. József nádor tér 1.) senpere, aŭ per poŝtmandato.

La abono estas por jaro (ses numeroj) Ft. 48.—, al eksterlando krome Ft 9.60 por afranko.

Eksterlande disvastigas „KULTÚRA" Eksterlandkomerca Entrepreno por Libroj kaj Gazetoj — 1389 Budapest, Pf. 149. Abonprezo por eksterlandanoj pojare 6 Usonaj dolaroj aŭ egalvalojaj sumo en alia valuto.

75.4390 Dürer Nyomda
Gyula
Indexszám: *25.377*



Plurcela akvorezervujo — la lago de Pécs. Ĝia val-digo kolektas kaj rezervas akvon por ferii, sporti kaj akvoprovizi

Konsumturist



Valoraj artobjektoj
porcelano de bona marko
stilmebloj

Varojn aĉetitajn
en supraj vendejoj oni povas
sendogane elporti el la lando

Vi povas aĉeti el granda sortimento kontraŭ valuto internacie ŝanĝebla

en niaj vendejoj en Budapesto:
I. Hess András tér 3
Hotel Intercontinental–Hotel Gellért